



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista

Unu numero : 7 FF. Abono por 1988 kun adresaro : 35 FF

Pĉk: 3371 74 M BORDEAUX, Cercle amical esp.agenais, F 47340 Laroque

ĈU ESPERANTO

Lutombo
Yogolelo

ESTOS BONAKCEPTATA EN AFRIKO ?

Nun, kiel ni scias, la mondon superregas serĉado de la profito. Sperto nin sciigas, ke per tio, kion homo faras nuntempe, li unue anticipas sian profiton.

Eĉ la divido de la mondo sciigas nin, ke la celo serĉata de ĉiu bloko estas la provo amasigi multe kaj tiel trudi al la aliaj sian volon, sian politikon, sian kulturon, ktp. Eĉ historio sciigas nin, ke oni asertis, ke iuj popoloj ne havis kulturon kaj ke pro tio estis necese trudi al ili unu el la ekzistantaj kulturoj!

Samtempe mi demandas min, kial multe da landoj perdas multe da mono por la esplorado en la militista tereno. Kial oni devas perdi multe da mono por fabriki malĝustajn armilojn? Ŝajnas, ke en aliaj landoj grandaj kapitaloj estas asignitaj al nesaĝaj projektoj, dum la nombro da senlaboruloj kreskas. Kiel kompreni, ke ĉiufoje, kiam la malriĉaj landoj produktas iun inteligentan, la riĉaj landoj lin forprenas por lin utiligi laŭ siaj propraj celoj. Kia egoismo!

La originon de Aideso (SIDA), tial ke ĝi estas terura malsano, oni devas serĉi en la malriĉaj landoj kaj ĉiuj teorioj devas kontribui al tiu tezo! La tria mondo estas frapata de ĉiu speco de krizo hodiaŭ sed aliloke oni vivas en tia superabundeco, ke oni trovas en Okcidento la malsanon de dikventro, kiu originas de "tro bona" manĝado; oni plezuras

rigardi la aliajn suferantajn kaj daŭrigi tiun malproksimigon inter la homoj.

Tiel, kie estas la loko de esperanto? Kie estas la loko de la lingvo, kiu volas kunigi la homaron? Kie estas la loko de la lingvo, kiu volas forigi la barilojn inter la homoj, la homoj, kiuj fariĝis egoismaj? Tiu lingvo estas grava sendube, mi devas eĉ diri necesa, sed nur tiuj, kiuj ankoraŭ konservas iom da humanismo, ĝin scias. Kaj la aliaj, ĉu ili ne scias ĝin? Mi miris eksciante, ke E° ĵus atingis cent jarojn da ekzisto! Jarcento de ekzisto, dum tiu lingvo kun noblaj inspiroj restas ankoraŭ nekonata en aliaj partetoj de nia mondo, ĉefe en Afriko; tamen ekzistanta en la spiritoj de la multaj erudiciuloj de niaj registaroj. Sendube intencanescio! Oni ŝajnigas ignori tiun lingvon, ĉar ĝi povas endanĝerigi iliajn profitojn.

Kiu en Afriko ankoraŭ adoras la francan lingvon, la anglan lingvon, ktp, post la praktikado de esperanto en la tuta mondo? Kaj la libro-industrio, la francakulturcentro, la anglakulturcentro, la usonakulturcentro, kiuj estos konkurataj de la esperanto-kulturcentroj, kia estos ilia estonteco?

Ofte mi pripensas kaj demandas min pri la estonteco de esperanto en Afriko; kian subtenon vere povos ricevi la internacia lingvo en Afriko kaj ĉe ties registaroj? Ĉar multaj el niaj registaroj estas subtenataj de la okcidentaj registaroj, la mono, kiun ili uzas, venas el okcidento, eĉ la manĝaĵoj. Kaj tiu sistemo estis kreita kaj volita de la okcidentaj registaroj, por ke reciproke ili trudu sian politikan volon kaj kulturan volon; tiel ili havas la eblecon bone ĉerpi la naturajn rimed-riĉaĵojn de Afriko.

En tiuj kondiĉoj la lingvo de la donacemulo estas trudata, ankaŭ lia kulturo estas trudata, lia geografio estas instruata, la lernanto devas konduki kiel la loĝantoj de la donacanta lando. En Nairobi kaj ĉie en Kenjo eĉ la infanoj surmetas kostumon kun kravato. En la "respektindaj" familioj, la angla devas esti la uzata lingvo, tiel trovi francajn aŭ germanajn artikolojn en la vendejoj aŭ bazaroj de Nairobi ne estas facile. Oni devas trudi la lingvon de la donacanto
(fino p. 40)

Ĉe SAT-Broŝurservo :

* ĵus elĉerpiĝis : **Varsovio 1887** (A. Lopez Luna)

Jacques RUFFIE

Membro de la franca Akademio pri medicino

Membro de la Akademio pri sciencoj de New-York

Profesoro ĉe la Kolegio de Francio

Mondfama biologo

LA HOMA SPECIO EN 1988 KAJ POSTE

Estas ĉiam danĝere profetumi. La sociologoj, kiuj ne antaŭsentis la venon de la "studenta revolucio" de 1968, la ekonomiistoj, kiuj ne antaŭanoncis la borsan disfalon malbrile mienas. La homa spirito estas neantaŭvidebla: tro da parametroj influas en niaj decidoj, ke ni povus ilin koni longe antaŭe. Nur la materiaj aferoj, aŭ ĉe la limo la kulturaj povas esti objektoj de prospektivo. Kio estos la homa specio en 1988 kaj en la sekvontaj tempoj? Kelkaj grandaj tendencoj, kiuj ne multe riskas inversiĝi, ebligas projekcii iajn lumojn sur la estontecon.

Unue, la demografia konsisto de la mondo. En 1830, post kvarmilionjara evoluado, la homaro atingis sian unuan miliardon da terloĝantoj. Unu jarcenton poste, en 1930, ĝi estis je du miliardoj. Tridek jarojn poste, en 1960, je tri miliardoj; poste sufiĉis dek kvin jaroj (1975) por transi kvar miliardojn. Nun, en tiu ĉi jarfino de 1987, ni vaste superis kvin miliardojn.

La kreskado pludaŭros ĝis la dua parto de la venonta jarcento, por plafoni versaĵe ĉirkaŭ 12-14 miliardoj. Tio estas nombro elportebla de nia tero, kondiĉe ke ĝi estu ekspluatata en racia kaj intensa maniero. La teknikoj de genaj rekombinoj kreos novajn rasojn de plantoj kaj dombestoj multe pli avantagajn ol tiuj, kiujn havigis la malproksima "neolitika revolucio", kaj kiuj, apenaŭ plibonigite, konsistigas ankoraŭ la ĉefan parton de niaj nunaj vivrimedoj.

Ankaŭ laŭstrukture ŝanĝiĝos la homaro. De la Renesanco, periodo de grandaj eltrovoj, ĝis la 19a jarcento, precipe Eŭropo "fabrikadis" homojn. Ĝi vaste surloĝis la Novan Mondon, Aŭstralion, Nov-Zelandon, kaj penetris iel ĉien pli-

malpli amase: de Siberio ĝis Fajrolando, de la bordoj de la Ĉina maro ĝis la Indus-ganga ebenaĵo kaj aliloke.

Iom post iom tiu movado inversiĝis, precipe ekde la Unua Mondmilito. Nun la demografia linio de Eŭropo plu sinkas, ĉar la naskoj ne kompensas la mortojn. Dum la industria kreskado, kiu sekvis la lastan mondmiliton, ni devis pro manko je laborforto, importi laboristojn venantajn ĉefe de la franc- aŭ latinlingvaj landoj kun troa popolkreskado: Portugalio, Magrebo, Nigra Afriko. Multaj el tiuj laboristoj enmigrintaj kun sia familio enplantiĝis. Iuj atingas la duan, eĉ la trian generacion. Ili asimiliĝis, perdante la deziron pri reveno. Ĉar ili ankoraŭ ne adoptis sintenon por malpliigo de naskado, ilia plimultiĝo pludaŭros dum ioma tempo, eĉ kun manko de ĉia nova ekstera alporto.

De nun post cent jaroj la gena profilo de la tradicia Francio estos iom modifita. La sama superloĝado, kun tendenco al eksporto, estas ĉie observebla en la Tria Mondo: centoj da Meksikanoj kaj aliaj Latin-Amerikanoj ĉiutage transiras Riograndon por instaligi en Usono. La hispana fariĝis la dua lingvo de Nordameriko, kiel islamo estas la dua religio en Francio. Kaj la Koreanoj nun reprezentas la enmigrintajn laboristojn en Japanio: tiujn, kiuj okupas la penigajn kaj malalte salajratajn postenojn.

La dua tendenco, precipe perceptebla en la industriigitaj landoj, kun favoraj higienkondiĉoj, ĝuantaj medicinan substrukturen kaj efikan socian protektadon, havantaj sufiĉajn nutrurimedojn, konsistas el la pliigado de la vivprobablo. En la komenco de nia jarcento, juna Franco je sia naskiĝo povis esperi vivi kvardek jarojn. Nun, krom akcidento, knabineto havas antaŭ si okdek jarojn, knabeto pli ol sepdek unu jarojn.

Ni traduku tiujn nombrojn laŭ paro : antaŭe oni geedziĝis kun proksimuma certeco resti kune dek kvin ĝis dudek jarojn. Nun la geedza vivo povas facile atingi duonjarcenton. Tiu plilongigita kunvivado levas novajn problemojn. Ĉu la granda usona sociologo Margaret Mead ne proponis anstataŭigi la geedziĝojn per kvinjaraj kontraktoj, senfine renovigeblaj per silenta interkonsento?

Ĉu la vivodaŭra espero ankoraŭ plu kreskos? Ja probable, ĝis certa limo. Nia ekzistado elvolviĝas laŭ gena programo konsistigita en la momento de la fekundado de unu ovulo de

nia patrino per unu spermatozoido de nia patro, fekundo, kiu konsistigas nian veran biologian naskiĝon.

Tiu programo portas en si ĉiujn niajn antaŭdispoziciojn, niajn gustojn, niajn kapablojn, niajn malfortojn, niajn fortajn punktojn. Sur ĝi venos greftiĝi la spertoj de nia vivo: nia edukado, nia metia akirado, aŭ niaj politikaj aŭ religiaj elektoj. Ĝi regas nian maljuniĝon, kaj neeviteble finiĝas per signaloj, kiuj diktas nian morton. En la daŭro de la historio niaj prapatroj mortis pro akcidentoj (kiel ankoraŭ multaj el niaj samtempuloj: laborakcidentoj, angiaj, aŭ kancero) sed multe da malsanoj, iam fatalaj (inter ili precipe la infektaj malsanoj) estis venkitaj.

Restas du tipoj de ankoraŭ minacaj malsanoj: la kor-angiaj akcidentoj (cerbaj, infarkto), kiuj gvatas unu Francan el du, sed kiuj fariĝas pli kaj pli kontroleblaj (la hipertensio, kiu estas ilia ĉefa kaŭzo, estas nun normaligita per longdaŭraj terapioj el la tipo beta blokanta aŭ diureza, kies surmerkatingo plilongigis je du jaroj la vivdaŭran probablon!). La kancero mortigas unu Francan el tri, sed ĝia terapio progresas. Strange, la "SIDA" multon instruante al ni pri la retrovirusoj, progresigis nian scion pri la kancerogenezo.

La patologio regresas, kiel la maljuniĝo. Tio estas okulfrapa, kiam oni konsultas la malnovajn dosierojn de la hospitaloj: antaŭ 1914, kvardekjaraj viroj kaj virinoj kondukita en la "hospicon" eniris en ĝin kun patologio de maljunulo, nun observata ĉe homoj de 80 jaroj aŭ pli.

Oni povas imagi por la estonteco popolon maljuniĝantan (normala fenomeno) en bona farto, kaj personojn milde estingiĝantajn post laŭirado de sia tuta genprogramo, kiu ĉe la Homo sapiens estas verŝajne ĉirkaŭ centjaro (la longo de la programo varias laŭ ĉiu specio: du miljaroj por la sekoj, 3-4 semajnoj por abeluja laboristino).

Sekve oni povas ekvidi socion, en kiu la aro de la bonstataj pensiuloj multe pezos per sia nombro. Samkiel tiu de la malsanuloj, sekve de la plifajnegado de la terapiaj metodoj, kiuj kuracas kaj resanigas.

Ĉi tie intervenos la nova nocio de preventa medicino. De nun analizante nian bienaron, konante niajn malfortajn punktojn, ni estos kondukita al praktikado de memmastrumado de nia sankapitalo, kiel oni mastrumas sian dombienaron. Kiom

da malfeliĉoj evitotaj, kaj kioma malplipezigo por la Socia Asekuro!

Ĉe la alia ekstremo de la ĉeno, oni devos plilongigi la lernejan vizitadon. La naskiĝanta III-a Respubliko farigis eminentan kulturprogreson, igante deviga la instruadon, kaj kondukante la junulojn al la atesto pri elementa lernado. Nun la lando bezonas, ke ĉiuj, aŭ preskaŭ ĉiuj, estu abituriento, kaj morgaŭ inĝeniero. En tio Usono kaj Japanio antaŭenpaŝis. Malpli altigante la aĝon de emeriteco (kaj, plilongigante, kun la vivdaŭra probable, la daŭron de tiu ĉi), kaj plilongigante la daŭron de la lernado, oni malpliigos la tempon de la aktivado.

Tio metas, kaj jam metas antaŭ ni sociajn kaj financajn problemojn, kiujn neniu politika partio aŭdacas plene fronti. La estonta situacio pli komplikiĝas per la amasa invado de telematiko kaj robotiko en ĉiujn industriajn teknikojn. Iuj antaŭvidas kun timego tiun proksiman estontecon, en kiu la homa laboro, eĉ plej komplika, estos anstataŭita de "inteligentaj" maŝinoj, kaŭzantaj maldungojn.

Ĉi tie necesas meti fundamentan demandon: Ĉu endas distribui la laboron, por ke ĉiu ricevu salajron certigantan decan vivon, aŭ ĉu gravas antaŭ ĉio krei riĉaĵojn, kaj ilin juste distribui?

Persone mi preferas la duan hipotezon. La anstataŭigo de la homo per la tirbestoj aŭ la mueliloj, poste la relaksado per la vapormaŝino ne kreis senlaborecon. Ili ebligis ricevi rimedojn en granda kvanto. Freŝdate, dank'al la fervojaj aŭ maraj transportoj, oni povis ilin transporti je malalta prezo en longaj distancoj. Ĉiuj landoj senescepte, kiuj profitis de tiuj teknikaj akiraĵoj, vidis sian vivnivelon plialtiĝi, kia aĝn estas la politika reĝimo (tiu ĉi ludas rolon precipe en la distribuado).

Al tiu demando aldoniĝas alia, ankoraŭ pli fundamenta: ĉu la homo estas farita por laboro forta kaj ripeta, de tipo animala aŭ mekanika, aŭ ĉu nia alvokiteco sidas en io alia, nome en la sfero de la abstrakta penso, de la arto, de la koncepto, de la serĉado, de la eltrovado, de la novigado? Por ĉenlaboristo, kion kontentigan povas prezenti la milfoje en ĉiu tago ripetata gesto: streĉi la saman bolton, niti la saman ladon, doni la saman lakoŝprucon al la karoserio, kiu ĉiun duan aŭ trian minuton prezentiĝas antaŭ li? Kian pers-

pektivon de pliriĉigo, aŭ simple de homecigo li havas malantaŭ tiu ĉiama alternado metro-labor-dormo? Kio restas el la "homa fakto"?

Vere, ĉar la progresiva evoluado nun situas en la sfero de la scio, de la interŝanĝo, de la invento, ĉiu teknologio devas ne servutigi la homon, sed lin servi. La akcelaj progresoj de la scienco ebligas antaŭvideti por la homaro la grandegan antaŭensalton de la III-a jarmilo.

Bedaŭrinde ni ankoraŭ vivas en sociaj sistemoj hereditaj de la XIX-a jarcento, en kiu la laboro estis rigardata kiel varo, kies prezo estis akre pridisputata. Tiuj sistemoj ne kapablas ekspluati en justa maniero la vastegajn eblojn al ni ofertatajn. La progreso fariĝos nur pere de nova civilizacio.

Ni deziru, ke 1988 malfermiĝu sur tiu ekkonsciigo kaj tiu demandometo. Ne estas nun tro frue, por tion pripensi.

Jacques RUFFIÉ

(La Dépêche-Magazine

27an de decembro 1987, p.2)

Kun la afablaj permesoj de la aŭtoro

kaj de la Direktoro de "La Dépêche du Midi". Tradukis VALO.

Paul Neergaard

Grava bato por ĉiuj amikoj liaj estas la forpaso de Prof. Paul Neergaard; ĝi des pli tuŝas nin, ke malgraŭ sia aĝo kaj sia laciĝo tiu pasia Esperantisto neniam volis eksteriĝi kaj ĝis la fino daŭre laboris. Malpli ol tri monatojn antaŭ sia morto, li prelegis por la Graz-a Konferenco pri la sciencaj aktivadoj en Esperanto ekde la komenco ĝis nun, informinte sin pri la lastaj nombroj koneblaj.

Iom poste, en Barlastono, li partoprenis je la ĉiujara renkontiĝo organizata de Marjorie Boulton. Tie, en la traduka kurso, li mirigis la ĉeestantojn per sia sento de la nuancoj, montrante, ke scienculo povas esti samtempe tre subtila beletremulo.

Tiel valora homo havis tamen ja neniam da orgojlo, kaj oni trovis en li profundan amon al la simpluloj: timedoj por helpi ilin li rigardis la sciencon kiel ankaŭ la Esperantan agadon. En la Instituto pri Sempatologio, kiun li direktoris en Kopenhago, li tro ofte konstatis lingvajn malfacilaĵojn ĉe la staĝantoj venintaj el la neanglalingvaj landoj: ili dediĉis la plejparton de sia tempo al la plibonigo de sia angla, malprofite de la studoj praktike utilaj, por kiuj ili venis.

Omaĝe je lia kara memoro, Marjorie Boulton decidis fondi stipendion, kiu ebligas al studentoj partopreni je Esperantaj kunvenoj. Liaj amikoj en

Francujo povas sendi sian kontribuon al s-ano Bernard AUNIS, 52 boulevard d'Anvers, 67000 STRASBOURG (poŝtkonto Strasbourg 1737 49 T), indikante: por la stipendio Paul-Neergaard.

RIMEDOJ POR LA FELIĈO

La homo posedas
Du mirindajn eblecojn
MEMORI kaj FORGESI
Memori pri la sorĉaj horoj
Forgesi la terurajn horojn
Dum la pasintaj doloroj stompigas
La feliĉaj eventoj denove vivas
En la menso kaj tra la koro
Iu poeto diris : Vivo estas Songo
Ne ; Vivo estas realo
Estas realo en nia karno
En niaj fibroj ĝi daŭras
Ĉu ni memoras
kiom da dentoj doloris al ni ?
Sed, funde de malliberejo,
La persekutato revivas
La filmojn kiujn li iam ĝuis
La muzikojn kiujn li iam kantis
La librojn kiujn iam li travivis
La turmentisto forpasis
Same kiel liaj turmentadoj
La sunleviĝoj kaj la lunleviĝoj
Ĉiam brilas en la memoro
Nur la perditaj geamatoj
Ne estas forgeseblaj
Sed, ni fidu la vivon
Ĝi alportos novajn.

Renato G.

NIKOLIN'

Cin mi malkovras
simila
kaj malsimila
kaj mi malkovras
ke mi ŝatas
tiun ĉi malkovron.

Poemoj de...

(el la kolekto "Die Umrisse meiner Liebe" - trad. Hagen Hirte)

Erich FRIED

LASTFINE

Kiel infano mi sciis :
ĉiu papilio
kiun mi savas
ĉiu limako
kaj ĉiu araneo
kaj ĉiu kulo
kaj ĉiu forfikulo
venos kaj larvos
se mi estos entombigata
Unufoje savite de mi
neniu devos plu morti
ĉiuj ili venos
al mia entombiĝo
Kiam mi plenkreskis
mi ekkonis :
Tio estas sen senco
Neniu besto venos
mi ĉiujn transvivos
Nun, oldiĝante,
mi demandas : Sed se mi savas
ilin ĝis tute lastfine
ĉu tamen eble venos du aŭ tri?

AŬSKULTU, ISRAELO

Kiam oni persekutis nin
mi estis unu el vi
Kiel mi restu tio
se vi iĝas persekutantoj?
Via sopiro estis
iĝi kiel la aliaj popoloj
kiuj murdis vin
Nun vi iĝas kiel ili
Vi transvivis
tiujn, kiuj kruelis al vi
Ĉu ilia krudeco
en vi plu vivas?
Al la venkitoj vi ordonis:
"Demetu la ŝuojn"
Kiel pekokapojn
vi pelis ilin en la dezerton
en la grandan moskeon de l'
morto
kies sandaloj estas sablo
sed ili ne akceptis la pekon
kiun vi volis surmeti al ili
La signoj de la nudaj piedoj
dezertsable
transvivos la spuron
de viaj bomboj kaj tankoj

NIKOLIN'

Pluki je ĉiu tagiĝo
iom da freneza revo
ĝin ekmordi malmola kaj tenera
en avida malsato.
En la sekega grundo
krei la miel-floron
por ĝin dispremi vermilion
sur la timemaj lipoj...

NIKOLIN'

La virinoj staras
staras
en la mano de l'silento
en la kajto de l'vento
staras
en la strato de l'soleco

Virinoj
virinoj venantaj
virinoj plaĉantaj
virinoj starantaj

Ili staras
kiel ?

multe el ili ne scias
aliaj aliel scias
tiuj kiuj vere volas
aliel scias.

Ili sentas kiam estas la momento
ili sentas kiam estas la turnopunkto
ne, ne la turnopunkto
sed ĉi turnopunkto.

Ĉar, eskapante el la estontaj sunoj,
estas dekoj
centoj kaj centoj da centoj
da turnopunktoj
floroj kaj turmentoj
amasigantaj ĉirkaŭ ili.

Kaj tie ili staras
virinoj venantaj
kaj ne gravas la jaroj,
virinoj plaĉaj
VIRINOJ.

Kiam la volo ami
superas la bezonon esti amata
tiam
riveligas la dinamismo de l'feliĉo
tiam
disvastiĝas la nekomparebla varmo
de l'sereno.

el "ALKROĈE AL LA VIVO"

Elfrancigis : Emile Van Damme

kaj Kribo

La Virino
posedas la ŝlosilojn

kiuj malfermas
la pordojn
de ĉiaj renkontoj

sed malmulte
da virinoj
tro malmulte
da virinoj
tion scias

kaj tro malmulte
da tion sciantaj
virinoj
aŭdacas tion scii.

Nia felietono :

FRAGMENTOJ DE NEKONATA INSTRUO
de Petro USPENSKO (OUSPENSKY)
(resumpecoj)

LA LUNO NUTRIGAS PER LA ORGANIKA VIVO (el la 5a ĉapitro)

La energio necesa por la kresko de la luno (kaj de novaj burĝonoj) venas de la Tero (kie ĝi kreiĝas per la kuna agado de l'Suno kaj ceteraj planedoj de nia sunsistemo kaj de la tero mem). Ĉi tiu energio konserviĝas en giganta akumulatoro situanta sur la Tera surfaco: LA ORGANIKA VIVO, kiu nutras la lunon, kiu funkcias kvazaŭ eksterordinara magneto. En la momento de l'forpaso, ĉiuj vivantaj estaĵoj ellasas iun kvanton da energio; ĉi tiu energio (aŭ ensemblo de animoj) estas altirata de la luno kvazaŭ per kolosa elektromagneto. De tio dependas ĝia kreskado, nome, la kreskado de l'Radio de la Kreado. La tuta organika vivo suferas la influon de la luno, nome, de ĉi tiu eksterordinara elektromagneto kiu suĉas ties vitalecon.

La homo ne povas liberigi de ĉi tiu influo en la ordinaraj kondiĉoj de la vivo. La liberigon el la lun-jugo oni povas atingi nur per la disvolvo de la mensaj povoj kaj fakultoj, la konscio kaj la volo.

GRADOJ DE MATERIECO

La materio ĉiam samas, sed la materieco diferencas. La materieco de l'Absoluto estas de ordo malsama je la materieco de ĉiuj galaksioj, kaj siavice, la materieco de ĉiuj galaksioj malsamas de la materieco de ĉiuj sunoj, kaj tiu de la sunoj diferencas de la Suno, ktp. ktp.

La malsamaj gradoj de materieco dependas de la kvalitoj kaj karakterizoj de la energio manifestata en determinita punkto. La materialo aŭ materio estas tio permanenta; la ŝanĝoj de l'materio estas manifestiĝoj de forto aŭ energio; la ŝanĝoj rezultas el vibradoj (= ondemaj movoj) kiuj startas de la centro, nome, de la Absoluto, kaj iras ĉiudirekten. La universo konsistas el vibradoj kaj materio, aŭ el vibrokapabla materio. La rapideco de l'vibradoj estas en inversa raporto al la denseco de l'materio. En la Absoluto la vibradoj estas pli rapidaj kaj la materio malpli densa. En la Mondo 3

la vibradoj estas malpli rapidaj kaj la materio pli densa; en Mondo 6 eĉ malpli rapidaj, kaj la materio eĉ pli densa, ktp.

La materio konsistas el atomoj (Atomo: rezulto de la fina divido de l'materio, - primitivaj partikloj-) Nur la atomoj de l'Absoluto estas nedivideblaj.

MONDO 3: ĉiu atomo estas formita de 3 atomoj de l'Absoluto (3-oble pli granda kaj pli peza, kaj 3-oble pli malrapida movo);

MONDO 6: ĉiu atomo formita de 6 atomoj de l'Absoluto...;

MONDO 12...; 24; ktp. ktp. Nome, estas 7 klasoj de materio. Ĉiuj ĉi tiuj klasoj de materio interpenetriĝas.

En MONDO 48 - la Tero -, la materio aperas solida, likva, kolojda kaj gasa; elektro-lumo-magnetismo.

Kiam la substanco kondukas: oni nomas ĝin:

" la 1-an forton (f. aktivan) KARBONO (K)

" la 2-an forton (f. pasivan) OKSIGENO (O)

" la 3-an forton (f. neŭtralian) NITROGENO (N)

La substanco sen rilato kun la forto kiu manifestiĝas tra ĝi, nomiĝas: ... HIDROGENO (H)

Tiel do: 3 rilatas al la forto kaj 4 al la materio.

LA DIAMETRO DE LA FIZIKA UNIVERSO

(El "Psikologiaj komentoj de D-ro Nikolo)

laŭ teleskopo de 100 coloj (=250 cm)... estas 600.000.000 (SES CENT MILIONOJ) da lumjaroj, kaj en ĉi tiu vastega spaco ekzistas CENT MILIONOJ da grandegaj stelaj sistemoj (= galaksioj), ĉiu el ili kun cent milionoj da sunoj.

MONDO 6 (ĉiuj sunoj) rilatas nur al la 100.000.000 da sunoj de nia galaksio aŭ Lakta Vojo (senpere videbla), el kiuj nur unu estas nia Suno. Ĉi tio bone klarigas ke ne estas ununura Radio de Kreado. Estas grandega nombro de Radioj de Kreado. Ĉi tie ni parolas nur pri NIA Radio de Kreado, en kiu estas ni.

Kiam ni asertas ke la homo estas en la universo, tio signifas ke la homo estas fakte en la laŭlitera, ekstera kaj videbla universo; kontraŭe, kiam ni diras ke la universo estas en la homo, tio - psikologie - signifas ke same kiel la universo estas en malsamaj niveloj, en la homo estas malsamaj niveloj: nivelo de esto, de kono, de kompreno kaj de konscio.


SIMPLA PENSO

Ĉu vi neniam pensis en vera, akrevida maniero ke vi troviĝas sur la Tero por tre malmulte da tempo?

ALIA: Ĉu vi ne pripensis ke la Tero estas parto de la

Suna Sistema, parto de l'Suno?

Estas ĉi tiuj simplaj, akrevidaj, strangaj pensoj, kiuj metas nin en komunikon kun la Radio de Kreado.



DESUPRA SKALO (aŭ DESUPRA OKTAVO)

	1	DO	ABSOLUTO
MONDO	3	SI	GALAKSIOJ (ĉiuj)
MONDO	6	LA	NIA GALAKSIO (aŭ Lakta Vojo)
MONDO	12	SOL	SUNO
MONDO	24	FA	PLANEDOJ
MONDO	48	MI	TERO
MONDO	96	RE	LUNO

La diagramoj devas esti komprenataj. Unue ili estas registrataj de la formiga aparato (Mekanika parto de l'intelekta centro), poste kiam ili atingas la superan aŭ emocian parton de la Intelekta Centro (kaj poste al la Emocia Centro mem), ili povas esti komprenataj, nome, ĉi tiu estas la celo de l'psikologia laboro: konekti homon kun la superaj centroj mem (superaj centroj: emocia kaj intelekta). Ĉi tiu laŭgrada procezo nomiĝas VEKIĜO. Se homo forneas ĉian signifon al la universo, la superaj partoj de l'centroj estas blokitaĵ per lia sinteno.

ĈU LA HOMO ESTAS SENMORTA AŬ NE ?

Homo estas kaj ne estas senmorta! Kion signifas senmorta?

Ĉu ĝi rilatas al absoluta senmorteco aŭ oni akceptas malsamajn gradojn de senmorteco? Se ekzemple, post la fizika morto, pludaŭras io kio vivas ankoraŭ iom da tempo, konservante sian konscion, ĉu oni rajtas nomi tion senmorteco aŭ ne? Kiom da tempo devas daŭri tia ekzistado por nomi ĝin senmorteco? Ĉu tio do ne implicas la eblecon de malsama senmorteco laŭ la homoj? Fakte, nenio estas senmorta, tial, pli bone anstataŭigi la vorton "senmorteco" per la vortoj: "postmorta ekzistado". En tiu kazo la homo havas eblecon de postmorta ekzistado. Sed ebleco estas unu afero kaj la realigo de tiu ebleco estas alia! Tiu ebleco dependas de la psikologia LABORO PRI SI, kiun la homo devas fari.

LABORO PRI SI

La koĉero (intelekta centro) devas aŭdi kaj kompreni la voĉon de l'mastro (Realaj Konscio, Volo kaj Mio) kaj devas scii kiel konduki; la ĉevalo (emocia centro) devas esti dresata por obei la koĉeron (intelektan centron) per la bridoj (Memoro pri si kaj ekstera konsidero). Mallonge, la LABORO PRI SI devas komenciĝi per la koĉero. Por povi aŭdi la voĉon de l'mastro, la koĉero devas vekigi, lerni la lingvon de l'mastro, kaj lerni konduki la ĉevalon kaj bone gvidi la kaleŝon (la fizikan korpon). La intelekto devas lerni regi la emociojn; la emocioj ĉiam kuntrenas la korpon. Tial por direkti la ĉevalon oni devas surmeti al ĝi la bridojn. KONKLUDE: La laboro pri la "korpoj" (nome, pri la koĉero, la ĉevalo kaj kaleŝo) estas unu afero, kaj alia afero estas la laboro pri la "konektoj", nome, "la kompreno de l'koĉero" kiu ligas lin al la mastro; la bridoj kiuj konektas lin al la ĉevalo, kaj la jungilaro kiu konektas la kaleŝon kun la ĉevalo. Se la konektoj ne establiĝas, la homo estas regata ne de la volo de l'mastro, sed de la akcidento! En ĉi tiu kazo, ĉiuj funkcioj estas regataj de la fizika korpo.

	+1	-2	-3	-4
KORPO :	fizika aŭ KARNA	astrala aŭ NATURA	mensa aŭ SPIRITA	kaŭza aŭ DIECA
CENTRO:	INSTINKTA -MOTORA	EMOCIA	INTELEKTA	MASTRO (KONSCIO)

En alia kazo, la 2-a korpo (la emocioj) regas la fizikan kaj la mensan korpojn. En la 3a kazo, la mensa korpo (la intelekto) regas la astralan (emociojn) kaj fizikan korpojn; kaj en la lasta kazo, la 4a korpo regas la tri unuajn.

NOME: La fizikaj funkcioj povas regi la senton, la penson

kaj la konscion. Due: La sento povas regi la fizikajn kaj intelektajn funkciojn. Trie: La penso povas regi la fizikajn kaj emociajn funkciojn. Kvare: La konscio povas regi la fizikajn, emociajn kaj intelektajn funkciojn.

En la homo, kiu havas 2, 3 kaj 4 korpojn, la pli aktiva korpo estas ankaŭ tiu vivanta pli longe, nome, ĝi estas "senmorta" en rilato kun sia malsupera korpo.

ABSOLUTO	1	
GALAKSIOJ	3	leĝoj
LAKTA VOJO	6 --- KORPO KAŬZA (dieca)	6
(NIA GALAKSIO)		
SUNO	12 --- KORPO MENSA (spirita)	12
PLANEDOJ	24 --- KORPO ASTRALA (natura)	24
TERO	48 --- KORPO FIZIKA (karna)	48

La ordinara homo (1,2,3 kaj 4) posedas nur fizikan korpon. Kiam ĉi tiu korpo mortas, nenio transvivas. La fizika korpo konsistas el teraj elementoj kaj kun la morto, revenas en la teron. "POLVO ĜI ESTAS KAJ POLVO ĜI FARIĜOS".

Se li posedas la duan korpon, li transvivas iom da tempo. Se li posedas la trian korpon (konsistantan el Sunelementoj) li transvivos iom pli da tempo. La 4-a korpo estas formita el elementoj de la stela mondo (ĉiuj sunoj) kaj la homo kiu atingis la kristaliĝon (sur korekta bazo) posedas la kvaran korpon, kaj sekve li estas senmorta en la limoj de l'suna sistemo.

KONKLUDE: Nun kompreneblas kial oni ne povas tujuje respondi per jeso aŭ neo al la demando pri la homa senmorteco. Unu homo estas senmorta, alia ne; tria klopodas ekesti senmorta, kvara imagas esti senmorta kaj li estas nur peco de karno. (Kun oftalmoj kiuj ne vidas! - aldona komento de la kompilinto).

Resume kompilis: ERGOTO DE BONAERO.

MAZDAĴETOJ

Konsolo

Post la plej granda ĉagreno
ĉiam alvenas sereno.

Pri riĉulo

Kvankam
ĉion posedas
tamen
vivo lin tedas.

Objektive

Estas vero,
mi ne klaĉas,
mazdaĵetoj
al mi plaĉas.

Fermitokule

Mi diros al vi sincere:
kisi mi povas parkere!

Mistera framasonismo

Kiel esperantismo, framasonismo aspiras al universalismo. Ĝi estas ofte kritikata de antaŭjuĝemaj personoj, kiuj konas ĝin nur laŭ onidiroj aŭ laŭ neamika propagando de iuj, kiuj timas ĝin. Ĝenerale ĝi estas nekonata de la plimulto.

Oni devas konfesi, ke malhelpas tion ĝia malfermata strukturo, rezervata al la unuaj ensekretigitoj. En nia epoko, kiam renaskiĝas ĉiaj superstiĉoj kaj senĉese ekaperas multaj sektoj, kleraj scivolaj homoj serĉas pli koni framasonismon. Libroj estas regule eldonataj, sed pro esotera karaktero, ili estas destinataj precipe al fakuloj.

Esperantismo kaj framasonismo celas ambaŭ fratecon kaj humanismon. Prave oni povus pensi, ke ili estas parencoj. La realeco estas alia: malmultaj estas la framasonistoj, kiuj praktikas la internacian lingvon. Se ni trafoliumos jarlibron de UEA, ni konstatos ke nur kelkaj sudamerikaj delegitoj aperigas tiun identecon. Eble aliuloj prisilentas sian apartenon al sekreta aŭ diskreta societo, pro ia politika reĝimo de sia lando?

Ne ĉiam estis tiel en la estinteco, ĉar la "Enciklopedio de Esperanto" eldonita en 1933 donis jenan difinon de framasonoj: "Komuneco de libere pensantaj homoj, kunigataj en loĝioj. La deveno estas de mezepokaj gildoj de masonistoj. La konstruado estas komprenata laŭ morala senco. Konstitucio 1721 verkita de Anderson. Pro politikaj kaj religiaj konsideroj ofte atakataj (UEA - 1928). Jam dum la 1-a UK 1905 oni fondis Universalan Framasonan Ligon kaj ankaŭ dum aliaj UK-oj la framasonoj aranĝis fak-kunvenojn, ekz. dum la 7-a UK kun helpo de la lokaj loĝioj. En 1907 svisaj framasonoj (Bern) decidis larĝe uzi E-on por internaj rilatoj, tiucele estis eldonita en E broŝuro kaj dissendita tra la tuta mondo, sed mankas informoj pri la efektiva uzado."

Ĉu "Universala Framasona Ligo", kies sidejo estas en Svisio, konsistas el postvivaĵo de tiu malproksima idealo? Ĉu ĝi ankoraŭ ekzistas? Ĉiukaze ĝi ne plu plenumis la esperojn de esperantistaj framasonoj. Malgraŭ klopodoj de iuj fratoj, ĝi blinde ignoris nian lingvon, uzante la anglan, la unuan, kiun ĝi konsideris kiel universalan. Vane oni esperis, ke ĝi adoptus la duan, ĉar la esperantistaj membroj estis verŝajne tro malmultaj.

La neinteresiĝo de la fratoj por nia lingvo certe rezultas de l'fakto, ke, ĝis nun ĝi ne estis uzata en propra societo, kies plej signifoplenaj utiloj ĉe la plimulto el ili estas politikaj, aferaj kaj edukaj.

*
* *

Neniam la originoj de framasonismo estis definitaj kun certeco. Iuj pensas ke tiu frataro estis la daŭrigo de fama Ordeno "Kavaliroj de la Templo",

post ilia likvido fare de Filipo la Bela, reĝo de Francio, en 1307, kaj mortigo de Jakobo de Molaj, Granda Mastro, pro liaj ĉiam pli kreskantaj potenco kaj riĉeco. Kiel ofte en tiu epoko, la realaj kialoj elvokitaj en aĉa proceso estis nebulaj kaj la suverena volo absoluta. Aliaj, plimultaj, opinias, ke framasonoj devenas de mezepokaj katedralaj konstruistoj. La masonistoj kunvenis en ĉambroj, nomitaj ankaŭ loĝioj, meze de konstruotaj monumentoj. Tiu korporacio estis dividita laŭ gradoj: mastroj, kunuloj, metilernantoj, kiuj diskutis pri la arkitekturaj sekretoj. Oni eltrovis signojn gravuritajn sur tiuj loĝiaj muroj, kaj ili estis atente studitaj pro sia simbola valoro.

La nuna framasonismo devenas de angla-saksa origino kaj estas nur teoria. Protestanta pastoro Anderson verkis ĝian konsitucion en 1721. Ĝi estis malfermita al ĉiuj "liberaj, strikte honestaj, virtaj personoj" de aristokratio kaj inteligenta burĝaro. Ĝi plivastiĝis rapide inter la civiliza mondo kaj "laborejoj" estis kreitaj sub protekto de la "Granda Loĝio de Anglio".

La ricevo de konsento de tiu Loĝio estas ankoraŭ nun pasporto cele al internaciaj framasonaj vizitoj kaj rilatoj. Precipa kondiĉo estas konsento ĉe la diversaj skoloj pri la dia aserto, kies framasona nomo estas "Granda Arkitekto de la Universo". Ĉeesto de Biblio en ĉiu laborejo estas same deviga. Ĵuroj estas donataj super ĝi. Ekde tiu momento la kandidatoj fariĝos "Filoj de la lumo" laŭ Johana Evangelio.

Tiu framasonismo estas nomata ankaŭ "regula" kaj ĝi devigas siajn membrojn kredi je Dio laŭvorte kaj ne simbole. Tia postulo jam ofte ofendis liberajn spiritojn kaj estigis multajn skismojn. Pro tio memstaraj skoloj estis kreitaj en pluraj landoj, precipe en Eŭropo. Ili forĵetis la sanktajn simbolojn, provokinte rompon kun regulaj loĝioj.

La diversaj skoloj estas ĝenerale nomataj "Granda Oriento" kaj "Granda Loĝio" kun almeto de la nomo de la tiea lando.

Alia antikva regulo malpermesas aliron de virinoj. Tio ne plaĉis al tiuj, ĉar ili sukcese kreis siajn neregulajn proprajn skolojn, kiuj staras por nuraj virinoj aŭ por ambaŭ seksoj, kaj kies nomoj estas "Granda Virina Loĝio" kaj "Homa Rajto".

En eŭropaj landoj, kie la katolika Eklezio estas ankoraŭ potenca, loĝioj laboras diskrete, se ne sekrete. Tiuj ĉi neniam forgesos ĝiajn persekutojn, anatemojn kaj malamajn sentojn, kiujn ĝi diskonigis inter siajn piulojn kontraŭ la framasonoj.

En la komenco, multaj katolikoj estis membroj de la loĝioj, sed ili forlasis ilin post ekskomuniko de papo Klemento la XII-a en 1738, kaj tiu de Leono la XIII-a en 1902, kiuj kondamnis la t.n. sekreton kaj opiniis pri komploto kontraŭ la Eklezion.

Nuntempe oni ne plu ofte paroladas pri framasonismo, sed oni rimarkas ke la nuna papo Johana-Paŭlo la II-a ne konsentas tiun Ordenon kaj plu daŭrigas kondamni ĝiajn membrojn, malgraŭ universalaj klopodoj entrepren-

itaj jam de kelkaj jardekoj ambaŭflanke por provi forigi tian malamon. Pro tio la papo rekunigas la plej ekstremajn dekstrajn pastrojn, nomatajn ankaŭ "integristaj", li subtenas dekstran totalismon kaj, mirige, komunismajn reĝimojn, kiuj malhelpas framasonismon!

Ni ne povos preterlasi la turmentadon de la naziaj hordoj dum la lasta milito. Ili malpermesis la Ordenon, punekzilis ĝiajn membrojn en malliber-ejojn kaj mortigis multajn. Esperantistoj kun sama humana idealismo pereis en samspecaj teruraj kondiĉoj pro siaj ideoj.

Judoj ĉiam partoprenis la vivon de la loĝioj, vigligante la rasan malamon de germanaj okupantoj kaj landaj kunlaborantoj. La malamikoj faris kontraŭ-framasonajn elontrojn en temploj por instigi ankoraŭ pli da malamo kontraŭ la fratojn. Ili same opiniis, kiel la antaŭa Eklezio, kiu ne toleris kunvenojn de liberaj homoj, kies sekretojn ĝi ne povis scii.

Membreco al tiu Ordeno estas tre petata en landoj, kie protestantismo estas potenca. Estas ja referenco kaj motivo pri fiereco. En Usono, akcepto estas pli facila; la framasonoj estas multaj kaj ili ne timas veni eksteren. Apartigo ankoraŭ ekzistas kaj koncernas precipe la nigrulojn.

Okazas, ke pseŭdoframasonoj misuzas la nomon mem de la frataro por krei falsajn loĝiojn, kiel lastatempe P2 en Italio.

Pro tiaj multaj malfacilaĵoj, sekreto kaj diskreto, kontakti eventualajn kandidatojn ne ĉiam estas facile. Framasonoj informiĝos pri ilia ĉiutaga vivo kaj juĝos, ĉu ili posedas la moralajn, liberpensajn kaj maturajn kvalitojn. Ne gravas la aĝo: maljunuloj eniras loĝion, sed tridek kvin estas la ideala.

Oni fondos dosieron je la nomo de la kandidato kaj, poste, frataj kunvenoj voĉdonos pri ilia akcepto. Pro diversaj motivoj, iuj neniam transpasos la pordojn de la templo. Oni fariĝas framasono por la vivo, sed eksigoj estas ĉiam eblaj pro malbona konduto aŭ nepago de kotizo. Malmultaj estas la fratoj, kiuj petas implicite sian membran nuligon.

La esenco de framasonismo estas esoterismo, filozofio, frateco kaj uzado de abundaj ritoj kaj gestoj. La inklino al mistero favoras alkutimiĝon de nova adepto, kiu esperas koni ankaŭ veran amikecon. Lia promeso estas tiu de kuraĝaj homoj, kiuj ne timas konfliktojn.

La anoj estas ofte politike kaj sociale aktivaj. Ili fratece kunvenas en temploj, sed ekstere iliaj agoj ne ĉiam akordas kun foje tro belega idealismo.

Ĉiuj intelektaj fakoj liveras sian kontingenton al la movado. Instruistoj estas foje abundaj. Apartaj fakaj frataroj kreiĝas kaj kunvenas, ne pro framasona laboro sed pri specifaj interesoj. Gravaj politikistoj estas ĝenerale varmetaj framasonoj pro abundaj profanaj kunvenoj kaj laboroj.

Oni postulas de la kandidato, ke li estu libera, kun bonaj moroj. Antaŭe, sklavo ne rajtis fariĝi anoj de la Ordeno, sed nun oni konsideras, ke tia libereco koncernas la spiritan aspekton de la persono kontraŭ konvenciojn kaj antaŭjuĝojn de nia socio. Nuntempe, kiu povus ankoraŭ difini la nociojn pri bonaj moroj?

Uzo de ritoj kaj simboloj ne evoluas. Obstina daŭrigo de la tradicio ŝajnas neŝanĝebla.

Fratoj kunvenas sub direktado de Loĝia prezidanto kaj altrangaj oficiroj. La Granda Mastro estas la estro de la Ordeno.

Elementoj de la naturo, bibliaj kaj legendaj rakontoj, antikvaj egipt-ajfoj estas la precipaj simbolaj iloj uzataj. La fratoj komunikas inter si per signoj, gestoj kaj pasvortoj. Ortilo kaj cirkelo estas universale konataj. La tri punktoj ••• simbolas rektecon, kio estas la bildo de framasonismo.

Sekreto pri ĉio okazanta en laborejoj kaj helpo al la fratoj estas du ĉefaj devoj.

Ensekretigo estas necesa, ne nur por eniri la Ordenon, sed ankaŭ kiam la metilernanto iĝas kunulo kaj mastro. Tiuj ĉi gradoj estas uzataj en t.n. bluaj loĝioj aŭ de Sankta Johano.

Poste, framasonoj, kiuj deziras pli plenan formadon eniros suprajn loĝiojn, kies nomoj estas Kanonika konsilantaro kaj Aeropaĝo. Ili surprenas plej suprajn gradojn kaj dependoj de alia aŭtoritato: la Superega Konsilantaro.

Regulaj ĉeestadoj kaj verketoj pri filozofio, psikologio kaj aliaj temoj estas necesaj por akiri rangaltiĝon.

Unu aŭ pluraj temploj staras en urboj kaj eĉ foje en vilaĝoj; ili estas posedaĵoj de unu aŭ alia skolo. Kunvenoj de fratoj, kiuj apartenas al malsamaj ordenoj povas okazi en sama ĉambro laŭ la tagoj. Foje oni identigas framasonajn templojn laŭ tradiciaj simboloj, gravuritaj sur frontono de du kolonoj, tiuj de Reĝo Salomono. Plejofte oni vidas nenian eksteran signon kaj la aspekto estas sobra. Ne eblas rigardi internen, ĉar la grizaj muroj estas ĉiam blindaj. Iliaj ŝtonoj, alia ĉefa simbolo kaj baza materialo de arkitekturo, estas enigmecaj.

Malofte, profanoj prelegas dum specialaj kunvenoj kaj same edzinoj ĉeestas aliajn. Tiaj ceremonioj estas "blankaj" laborkunvenoj kaj la fratoj ne surhavas siajn framasonajn vestojn nek insignojn. Dum inicoj frakoj estas devigaj.

Se vi havos la bonŝancon eniri, post halo kaj antaŭĉambro vi atingos la trinkbufedon kaj bankedan salonon, kie, dum festoj, fratoj agrable kaj ĝoje paroladas, ridas kaj eĉ kantas fakajn kanzonojn. Estas aliaj ĉambroj por ĉiuspecaj konferencoj, kaj severmoraj pripensaj kabinetoj gastigas novajn adeptojn. Tie ili skribe kaj parole prirespondas ĉiajn demandojn.

La precipa ĉambro estas la templo mem, koro de la laboraj framasonoj. Oficiro gardas ĝiajn pordojn kaj li povas postuli pasrajtigan vorton. La Loĝia prezidanto kaj aliaj oficiroj havas proprajn lokojn; ili malfermas kaj fermas la laborojn kaj donas ĉiujn direktivojn al la fratoj, kiuj sidas en dekstra kaj maldekstra sidfakoj. Ĉiuj estas vestitaj de simbolaj laborvestoj, kies ĉefa estas leda antaŭtuko, blanka por metilernantoj kaj kunuloj, laŭ diversaj koloroj kaj desegnoj por la mastroj, laŭ la loĝioj kaj gradoj.

Esplorado de memkono kaj atingo de morala kaj intelekta perfekteco

estas instru-celoj ĉe framasonoj. Teorie, ĉio fariĝas harmonie laŭ humanaj principoj kaj respekto por la bonstato de la homoj. Ili devas montri neniun diferencon pro sociaj klasoj aŭ antaŭjuĝoj, kaj helpas siajn fratojn kaj alulojn, kiam eble aŭ necese.

Tio estas bonegaj celoj, kiuj estas ne ĉiam facile atingeblaj! Ni ne forgesu ke framasonoj estas nur homoj kun ties kvalitoj kaj mankoj.

Politikaj eminentuloj, filozofoj, landprezidantoj, generaloj, eĉ reĝoj estis kaj estas ankoraŭ membroj de ĉiaj loĝioj. Foje ili iĝas Granda Mastro de ia skolo. Plej sentokapablaj stilistoj kaj komponistoj, kiel Goeto kaj Mozarto estis fratoj. La "sorĉa fluto" de tiu ĉi estas fama framasona opero.

Adeptoj, kiuj ĝin deziras, ricevas superajn gradojn kaj provas proksimiĝi al perfekteco, kondiĉe ke ili regule partoprenu laborkunvenojn kaj skribu filozofiajn verketojn legotajn en loĝio.

Framasonismo estas ankaŭ filantropa organizo. Dank'al donacoj de siaj membroj ĝi helpas bonfarajn asociojn, adoptas gefilojn de fratoj, subtenas vidvinojn.

Dum jarcentoj ĝi estis ofte kritikata, eĉ timata, pro sia mita mistero. Se tia mistero ekzistas, ĝi vivas en nia mio dum nia traserĉo de la vero kaj de la senco de vivo

La influo de framasonismo estas ankoraŭ efektiva, sed oni ne troigu ĝian potencon. Se estintece ĝi foje plenumis gravan politikan rolon pere de registaroj, en la fino de la dudeka jarcento oni pli objekte konsideru tiun movadon. Estas fratara de juĝkapablaj homoj, kiuj laŭvorte praktikas tradiciojn de malnova epoko, kaj plu transsendos ilin al siaj posteuloj. Ĝi estas ordeno kun neŝanĝebla ritara, kiu ne evoluas laŭ la tempo.

MAZDAĴETOJ

Konfesu!

En la fundo
de la koro
ĉiu estas
diktatoro.

Perceptu!

Mia bona konsilo:
interesiĝu pri ŝi,
kiam vi vidas brilon
en la ŝia pupilo.

Kiu naskiĝis - jam forpasas

Al mi fuŝas humoron
mia bona memoro,
ke jen mi maljuniĝas
de l'horu al la horo.

Pro armado

Nenio estas eterna,
precipe -
mondo moderna.

Mi, feliĉulo

Kia ĝojo ŝin revidi,
kun ŝi esti, kun ŝi ridi...

Lina Trenner-Gabrielli

Louise LABÉ kaj la 24 Sonetoj

Louise Labé estis subtila kaj delikata poetino de la XVI-a jarcento, kiu kun Maurice Scève kaj Pernette de Guillet ege honoris la Literaturan Skolon de Liono, tiam konkurantan kun la "Plejado"

Ŝi, la bela ŝnuristino, filino de Petro Charly, nomita Labé, naskiĝis en aprilo 1522 en Liono, ricevis bonan edukon en muziko kaj artoj, kaj lernis la lingvojn antivajn kaj modernajn.

Ŝiaj malfeliĉaj amospertoj al juna nobelulo inspiris Luizan al tri elegioj kaj dudek kvar sonetoj, kiujn ŝi publikigis en 1555 sub la titolo "Oeuvres" (verkoj), same kun aminda alegorio en prozo laŭ la gusto de la epoko, "Débat de Folie et d'Amour".

Edziniĝinte en 1544 al Ennemond Perrin, riĉa fabrikanto de ŝnuraĵoj, Luiza faris el sia hejmo la centron de la mondo klera kaj distingita de Liono. Ŝi mortis en aprilo 1566 en Parcieux-en-Dombes, en la nuna departemento Ain.

La 24 Sonetoj havas renomon senmortan, kaj ne ekzistas virino, escepte de Safoa, skribinta versojn tiel emociplenajn kaj pasiajn. Laŭ Paŭlo Eluard, la sincereco de Louise Labé estas subluma.

Enzo Giudici en la enkonduko al "Kanzonaro - La debato de Malsaĝo kaj Amoro", publikigita de la eldonejo Guanda en 1955, skribis ke "estis tempo, kiam ankaŭ en Italio la ekzistencialistaj studentoj ŝatis promeni kun la verko de Louise Labé subbrake, nur zorgante gustumi versojn kaj prozojn, sen ia kultura helpo."

Tiun kulturalan helpon donas al ni Enzo Giudici mem, kiu trans la dialogon limigitan al "hic et nunc" volis penetri la karakteron kaj la valoron de la Bela Ŝnuristino de Liono, farante diligentan esploron de ŝi rilate al ŝia tempo kaj klopodante klarigi unu dimension kun la alia, ĉar la figuro de Louise Labé, kvankam tute originala, estas la esprimo de la epoko, de tio, kion plej daŭran kaj plej naturan ĝi havas".

Liono, - diras Giudici, - estis tre prospera centro de kulturo kaj, en la duono de la XVI-a jarcento, ĝi konkuris kun Parizo, kie aktivis la movado de Pierre de Ronsard, nome "La Plejado".

Antikva Roma urbo, kie naskiĝis pluraj eminentuloj de

Imerio al Pietro Valdo, centro de la Sudo, lokita apud du riveroj, Rodano kaj Saono, kaj en la kruciĝo de du gravaj vojoj venantaj el eksterlando, Liono estis atinginta nediskuteblan prosperon, kiu manifestiĝis precipe pere de du industrioj: de la silko kaj de la libroj. Temis pri eldonistoj, kiuj ofte estis literaturistoj mem kaj kelkfoje kompostistoj kaj aŭtoroj. Kulturo kaj vivo, industrio kaj poezio bone akordiĝis kaj tio permesis al la Liona eldonado fariĝi aktiveco delikata, diligenta, ne populara, sed de antaŭgvardio, ne de amaso sed de elito.

En la tipo, kiun oni eldonis en Liono troviĝas la konscio de la kultura valoro de la eldonado, kiu estas unue suprenlevado de la spirito antaŭ ol esti komerco; en tiu tipo estis esprimita ankaŭ la socia valoro de la eldonado, kiu estas konsiderata kiel depono de la scienco kaj perado de la instruo. Pro tio estas tute nature, ke tiu ĉi urbo fariĝis la centro de intelekta fervoro, de kreado kaj de studo, kiu tute ne kontrastis kun la materiala socia prospero de la burĝo, sed, male, favoris ĝin kaj de ĝi estis samtempe kaŭzo kaj efiko.

Sekve, la verko de Louise Labé, kun la variaj moduloj de la Renesanco, intime akordiĝas je ĉio "same kiel kiam la poetino akompanis siajn versojn kaj tiujn de aliaj per la liuto".

Estis tiom la fervoro kun kiu Wilhelm Theodor Oeste, la tradukinto de la francaj sonetoj en esperanton, parolis al mi pri Louise Labé kaj pri ŝia sublima sincereco, ke mi eksentis apartan intereson por ŝi. Kaj la bona sorto permesis al mi legi la sonetojn ankaŭ en la itala traduko de Enzo Giudici, tiel ke mi povis ilin estimi en ĉiu nuanco.

Tiujn versojn ardajn kaj pasiajn mi retrovis en mia koro kaj sur miaj lipoj, kaj ilia ritmo, tiom natura, min akompanis kaj kantadis en mi. Ho, kiom mi estus skribinta, se mi havus pli da tempo je mia dispono, se mi povus min translasati al mia emocio!

Fidela, akurata, alloga estas la traduko de Wilhelm Theodor Oeste, kaj tio instigis min eldoni la sonetojn en la du lingvojn, la franca kaj la esperanta. Mia decido estis rapida, entuziasma, kaj ĝi provokis alian: fondi la eldonejon "Plejado", kies unua verko estas la **24 Sonetoj** de Louise Labé.

Estas vero, ke la liona poetino ne apartenis al "La Plejado", sed ŝi, kiel la poetoj de la Ronsarda movado, ensorb-

ita de itala kulturo, vidis en tiu ĉi literaturo ĉiam imitindan italan modelon.

Skribis Carlo Pellegrini: "Je la vigilo de "La Plejado" Louise indikis "kiom la itala poezio povas esti riĉa de procedoj kaj de formoj por literaturo, kiu estas serĉanta propran poetikan lingvistikon".

VALO



VORTOJ
DE
MALJUNULO

Burleske

La 5an de oktobro 1987 la franca televido prezentis grandiozan spektaklon. Multopa taĉmento da belaj respublikgvardianoj rajdantaj sur belaj ĉevaloj eskortis kirasveturilon, sur kiu kuŝis ĉerko kovrita per trikolora tuko. La procesio haltis antaŭ la perono de la Panteono. Tiam ok junaj fortikaj viroj en uniformo prenis la ĉerkon sur siajn ŝultrojn, solene supreniris la eksteran ŝtuparon, kaj eniris tra la pordego de la sanktejo, dum sonis la Marseljezo.

Kiun oni tiel honoris? Ĉu eble iun gloran militistan ĉefon? - Ne, erare: la mortinto iam ricevis la Nobel-premion pri paco. Eble tial, ke li, grave vundita en la abomena amasbuĉado de 1914-1918, estis unu el la unuaj, kiuj en junio 1940 aliĝis al Generalo Degol en Londono por daŭrigi la militon post la malvenko en la batalo de Francio?...

Sed li estis ankaŭ fervora, senlaca batalanto por la homaj rajtoj. René Cassin (Renato Kasen) estis modesta barbuleto kiel Zamenhof. Ĉu modesta? Tamen iam li esprimis la deziron, ke oni entombigu lin en tiu Panteono, apud Volter, Hugo, Zola, Jores kaj ceteraj. Sed li klarigis, ke per tiu pompa ceremonio oni altirus la atenton de la amaso pri tiuj homaj rajtoj, al kiuj li dediĉis sian aktivecon. Vere estas, ke antaŭ tiu tago multaj francoj, precipe junaj, se ne paroli

pri alilandanoj, tute ne konis lian nomon, kiun ili unuafoje aŭdis. Ĉu ili scias eĉ pri la Universala Deklaracio de Homaj rajtoj, kies iniciatinto kaj ĉefa redaktinto li estis ?

Restas, ke tiu kulto al kadavro, tiu burleska maskarado estas vere ridinda.

Fine parolis sinsekve prezidento Mitterrand kaj ĉefministro Chirac (Ŝirak). Ĉiu el ili emfazis la efektivigojn, kiujn li mem faris por la homaj rajtoj. Kiu politikisto preterlasus okazon por sin mem laŭdi kaj glori ?

Tiu omaĝo al la memoro de René Cassin inspiras al mi alian pripenson. Certe tiu viro, vere homa kun siaj malfortoj kaj kontraŭdiroj, estis meritplena. Oni tamen permesu, ke mi malpli admiru tiun juriston ol nian karmemoran Louis Lecoin (Ludoviko Lekŭen), kiu estis militrezistanto en 1914-18, kaj dum multaj jaroj, kvankam malfortika, sin dediĉadis al la defendo de la rifuzantoj de militservo. En la fino de sia vivo, malsana kaj malforta, li per malsatstriko fine cedigis la neflekseblan Generalon-prezidenton Degol, kaj ni ricevis en Francio leĝon ankoraŭ tre malperfektan, sed kiu tamen oficiale agnoskas la "konscienc-objetadon", t.e. la rifuzon de armita nacia servo pro konsciencia motivo.

Tia agnosko bedaŭrinde mankas en la Universala Deklaracio pri la homaj rajtoj verkita de R. Cassin. Ĝi rezultas en Francio de la heroe pacienca agado de L. Lecoin kaj de kelkaj aliaj, kiuj pagis per dumjaraj sidadoj en karceroj, kaj ofte perdo de la sano, sian homaranan sintenon.

Ni estis sep.

En mia libreto "**Kontraŭflue**" mi elvokis grupeton da adoleskantoj, kiuj gaje trakuris kamparon en la jaroj 1916-17. Mi revidas en freŝkoloraj bildoj miajn kunulojn: Johano, Amato, Roĝero, Renato, Marcelo, Luizoz, sume ses - mi estis la sepa.

Johano, delikatsenta, inspirata poeto kaj lerta desegnisto, havis belan vizaĝon kun grandaj brunaj okuloj, profunda rigardo, kaj harmonian voĉon. Li mortis 20-jara pro ftizo.

Humuristo diris, ke la plej certa rimedo por ne maljuniĝi estas morti juna. Johano montris al ni la vojon, sed ni ne sekvis ĝin.

Amato havis korpon de greka atleto. Li brilis en ĉiaj korp-ekzercoj kaj en ĉiaj manlaboroj. Li estis vigla, aventurema, ofte malsingardema. Li mortis 58-jara.

La blonda Roĝero, tiel belvizaĝa kiel Johano, tiel belkorpa

kiel Amato, same sporte lerta, same sentima, havis plie vibran tenorvoĉon, kaj estis nia muzikisto. Li mortis 66-jara.

Renato, la plej altstatura, ŝajnis ankaŭ la plej fortika, nedtruebla forto de la naturo. Li mortis 68-jara.

Marcelo, male, malalta kaj malgrasa, aspektis malforta. Tamen li neniam restis malantaŭe en lacigaj marŝadoj aŭ grimpadoj. Kvankam tre malsana en la fino, li vivis ĝis sia 72a jaro.

Restis Luizoz, kiu reaperas en mia memoro kiel bela nigra-hara junulo, alta, svelta, gaja kaj impeta kiel ĉiuj aliaj. Li forpasis 82-jara, antaŭ du jaroj.

El la sep mi restas sola.

Kial mi rakontis tiun funebran historion? Nur por montri, kiel malgaja estas pluvivado por maljunulo, kiu perdis sinsekve ĉiujn siajn amikojn de la juna tempo. El sep, unu post alia, ses malaperis. Kiam venos mia vico, neniu plu memoros pri la gaja amikaro.

Sed mi havas nun junajn geamikojn, kiuj memoros almenaŭ pri mi, dum kelka tempo. Ili siavice havos junajn geamikojn, kiuj konservos ilian memoron, ktp.

Tiel, en la sekvo de la tempoj, kunartikiĝas la ĉeneroj de la homa specio. Ni, unuopaj homoj, pasas, la homaro plu daŭras. Jen estas konsola penso.

Hejma idiomo

En la hejmoj de miaj geavoj estis kutime parolata okcitan-dialekto, ceven-langvedoka en Aleso, rodan-provenca en Arlezo, pli kaj pli konkurencata de la invadanta franca lingvo. Jam ĉe miaj gepatroj regis sola la franca. Ankaŭ ĉe mi. Sed, ekde kiam mia patro kaj mi kune lernis esperanton, ni devigis nin interparoli ĉiam en la lingvo internacia. Tiel ni akiris fluan praktikon.

Vi, kiuj estas almenaŭ du lernantoj en via familio, sciuj kaj konsciuj, ke vi havas bonan ŝancon : uzu ĝin plej profite, ne preterlasu tiun faciligan cirkonstancon. Iuj diros : sed Zamenhof hejme parolis pole. Jes, sed li estis Zamenhof. La Majstro kaj liaj proksimaj familianoj estis ĉiuj spertaj esperantistoj, kaj ne bezonis ĉiutagan hejman ekzercadon. Ne same estas pri ni.

Ĉiuj, kiuj partoprenis universalajn kongresojn aŭ staĝojn en Grésillon, La Chaux-de-Font, kc., scias per propra sperto, kiel rapide oni progresas en esperantista medio. Se ni ne

havas okazon nin bani en tia medio, ni strebu rekrei tian en nia propra hejmo, aŭ almenaŭ en niaj grupoj. En niaj tro maloftaj kunvenoj ni evitu krokodili. Ni kaptu ĉiun okazon por paroli nian komunan lingvon eĉ inter samnacionoj, tute same, kiel se, kun alilingvanoj, ni estus devigataj uzi nur la lingvon internacian. Nur tiel ni ne restos eternaj balbutantoj, eble kapablaj legi eĉ malfacilajn tekstojn, eble eĉ mem verki en esperanto, sed ne flue paroli. Nur per ofta ekzercado ni perfektigos nian parolon.

Kio kurigas maljunulojn ?

De kiam mia farto malpliboniĝis, mi pasigas multe da tempo en vizitado al diversaj kuracistoj, kurante de ĝeneralisto al specialisto, de homeopato al akupunkturisto, de farmaciisto al herbapotekisto, de ĉarlatano al venenisto. Restus nur al mi konsulti sendiplomajn resanigistojn, afrikajn sorĉistojn, aziajn guroojn, Christian-sciencists, atestantojn de Jehovo, ktp ks. Por kiu celo ? Ĉu por la espero iam reakiri mian junecon sanon? Mi ne havas tian iluzion. Ĉu do por ankoraŭ plilongigi jam tro longan ekzistadon? Parodiante la moton de la kontraŭabortistoj : "Lasu ilin vivi!" mi emus krei : "He, lasu nin krevi!"

Kio do min tamen logas al tiu ĉi sume malagrabra ekzistado? Ĉu la deziro vidi miajn gefilojn ĝui sian emeritecon, niajn genepojn travivi sian junecon kaj sian profesion agadon, kaj tiun pranepojn anoncitan por venonta decembro direkti al mi sian dolĉan rideton? Mi ja tamen scias, ke poste venos aliaj praidoj, kiujn mi nepre ne konos. Ĉu scivol-emo pri la daŭra elvolviĝo de la sciencoj kaj teknikoj, pri ĉiam novaj inventoj ĉu esperigaj, ĉu timegindaj? Ĉu la espero vidi novajn venkojn en la socia balotado, novajn akirojn de la homaro en bonstato kaj libero, novajn progresojn en la esperantista movado ?

Ja ĉio ĉi verŝajne kunefikas por alkröĉigi nin kadukulojn al vanta pluivado, kvankam konscia pri tiu vanteco. Eble obstina scivolemo estas la ĉefa afero, kiu motivas kaj movas la homon ĝis la lasta momento de lia vivo.

VALO.

ĈIES VOĈO

REJAL :

PLIBONO ESTAS MALAMIKO DE BONO

Kun intereso mi legis la artikolojn publikigitajn en L! rilate la lingvon Esp. skribitajn de A. Lopez Luna, Valo kaj P.M.G. Mi, kiu lernis E-on antaŭ la milito kaj forlasis ĝin dum pli-malpli 50 jaroj, povas doni miajn impresojn pri la evoluo de E-o dum tiu tempo. Oni povas konstati ĝian evoluon, kiam oni komparas la lernolibrojn kaj vortarojn de antaŭ la milito kun la nunaj.

Vortoj arkaikigis kaj estas anstataŭitaj per pli taŭgaj vortoj. Ekz. vagonaro/trajno. Ĉiuj trajnoj estas vagonaroj, sed ne ĉiuj vagonaroj estas trajnoj, same kiel la paseroj estas birdoj, sed ne ĉiuj birdoj estas paseroj. Alia ekz.: pirujo/pirarbo. Jam kiam mi eklernis la lingvon, min iom ŝokis la vortoj kun finaĵo UJO por nomi arbojn, ĉar se pirujo estas pirarbo, kiel oni devas nomi ujon, kiu entenas pirojn?

Mi miris konstati, ke multaj "mal"-vortoj estas anstataŭitaj per novaj vortoj kiel : febla, povra, trista, ktp. Kial oni povas senpune malobei la fundamenton? Oni tamen ĉiam insistas por observi la fundamenton kaj ne nur la 16 gramatikajn regulojn. Se iu kontraŭstarus tiun skribmanieron per ekz-e : malfebla, malpovra, maltrista, ktp, kien ni irus!! Mi ne komprenas la uzon de la vorto FAR, sen finaĵo.

Kiam mi relegas lernolibrojn kaj konsultas vortarojn, mi konstatas ke multaj vortoj tre similas inter si kaj inklinigas al konfuzo. Tio estas ne ĉiam evitebla sed, laŭ mi, oni tamen povus eviti, ekz-e, la 2 verbojn : trinki/drinki, kiuj tiel similas, ĉefe se oni ^{estas} malbonaŭdanto, kiel mi. Sufiĉus : trinki/trinkegi, aŭ eĉ trinkaĉi, kaj kiel substantivo : trinkanto, trinkulo. Oni povas multigi la ekzemplojn. Ni evitu kiel eble plej similecon kaj konfuzon. Ni evitu, ke E-o pli kaj pli "riĉiĝas" per senutilaj novaj vortoj, kiam estas eble sin esprimi, uzante la 16 regulojn. Ni evitu, ke E-o fariĝos tiel "riĉa" kiel la naciaj lingvoj, sed riĉa de malfacilaĵoj!

LO JACOMO titolis sian disertaĵon : Libereco aŭ aŭtoritato en la evoluado de E-o. Mi kredas, ke la evoluado de E-o

estas libera kaj aŭtoritata. Ĉiuj esperantistoj havas la eblecon fari proponojn aŭ sugestojn, eĉ la plej strangajn, sed nur la Akademio havas la rajton oficialigi kaj devigi la verkistojn de lernolibroj kaj vortaroj obei la decidojn de la Akademio. La estonteco de E-o estas grandparte en la manoj de ties membroj. Laŭ tio, se ili estas saĝaj kaj toleremaj, aŭ se ili estas spekulativaj harfenduloj!

Mi tute konsentas kun A. Lopez Luna (L!74, p.44): "Ni revenu al la fonto!" kaj kun P.M.G. (L! 75, p.48): "Ĉu la evoluo de E-o estas spekulativa afero?"

Se la evoluo de E-o devus esti tia, ke E-o fariĝus tiel malfacila kiel niaj naciaj lingvoj, mi krius "kolrompon!" Mi timas, ke tiam multaj esperantistoj forlasus niajn vicojn. Ni estas jam ne tiom multnombraj!

ERGOTO DE BONAERO :

Respondo al E. ĴAMARTO, p.43 en Laŭte! 74

Edgardo ĴAMARTO skribas ke post bonega artikolo pri PSIKOTRANSFORMISMO, li miregante konatiĝis kun 2 aforismoj: "Ni povas nur fortostreĉi esti kristanoj" kaj "Respektu ĉiujn religiojn".

Kaj Edgardo starigas plurajn demandojn; kaj laŭ tio kio sekvas, evidentiĝas ke mankas klarigo pri la senco de ambaŭ aforismoj, tial mi provos klarigi ilin kaj samtempe respondi la starigitajn demandojn.

Antaŭ ĉio, la aŭtoro de tiuj aforismoj estas la greka-armena filozofo Georgo GORGIADO, pli konata sub lia rusigita nomo GURDIEFO (Gurdjieff).

Rilate la vorton "kristanoj" necesas klarigi ke ne temas pri la membroj de la ordinara kristanismo, tia kia ĝi estas konata de ĉiuj, sed de la Kristanismo de la unuaj jarcentoj post Kristo, kies kono poste perdiĝis! Kaj estas oportune sciigi ankaŭ ke ĉi tiu neeklezia kristanismo - tute malsama de la nuna EKLEZIA - ekzistis jam ĉirkaŭ 10.000 (dek mil)!!! jaroj antaŭ Kristo! Ĉar ja la vorto Kristo, el la greka *ἁριστός*, signifas nur SANKT-OLEITO aŭ INICITO!!! Kaj la tasko de JesuKRISTO (nome, Jesuo la inicito) estis transdoni ĝin al la estontaj generacioj pere de la Evangelioj. Kaj la granda merito de GORGIADO estas ke li "retrovis" la ŝlosilon por ekzakta kompreno de la Evangelia instruo!

Do, resume, temas pri neeklezia, esotera Kristanismo, ne

pri eklezia, ekzotera Kristanismo! La vorto esotera rilatas al interna, nome, spirita disvolvigo.

Jen, ekzemple, la esotera Kristanismo (de Jesuo) diras, ke NI DEVAS AMI ĈIUJN HOMOJN KAJ BENI TIUJN KIUJ MALAMAS NIN.

Kaj nun ni demandas : - Ĉu oni devas ami sian najbaron aŭ malami lin? - Oni devus ami lin! Sed ĉu vi povas ami aŭ malami iun laŭ peto?

Antaŭ ĉio oni devas ESTI KAPABLA AMI, kaj nur tiam oni amos. Sed perdiĝis la kono de tio!

La verketo PSIKOTRANSFORMISMO estas nur ENKONDUKO al tiu instruo de la esotera Kristanismo! Kaj vi ne kapablas eĉ konjekti kien ĝi kondukas! En ĝi troviĝas kelkaj aludoj aŭ mencioj kiujn vi evidente tute preteratentis : p.14a. La influoj (B) de la Evangelioj (devenantaj el la cirklo de l' konscia homaro), kaj en p.22a troveblas la signifo de : "La diboĉema aŭ erarinta filo revenas hejmen" kaj "Vendu kion vi havas kaj donu ĝin al la malriĉuloj". Atente relegu tiun ĉapitreton "NOVA KRESKO DE LA ESENCO" kaj via kompreno kresketos!

Kaj jen iomete pli da tiu mirinda ŝlosilo kiun rehavigis al ni Georgo GORGIADO (kiaj liaj disĉiploj USPENSKO - Ouspensky - kaj NIKOLO - Nicoll) : Tra la Evangelioj, ĉie kie legiĝas PENTU aŭ PENTO, vi legu PSIKOTRANSFORMIĜU aŭ PSIKOTRANSFORMIĜO, kaj kie legiĝis PEKI aŭ PEKO, vi legu MALTRAFI LA CELON aŭ CELMALTRAFO kaj vi komencos ekhavi la ĝustan komprenon!

La 2 vortoj estas mistradukitaj el la greka lingvo : la unua METANOIA : trans la menso, signifas trans la ordinara menso kiu apogas sin sur la monda videbla, la mondo ekstera de la fenomenoj, nome de la fizikaj travivaĵoj, kaptibla de la sensoj, por tiel aliri al la mondo nevidebla, la mondo interna de la noŭmenoj, nome de la spiritaj travivaĵoj, kaptibla psikologie; kaj tiel la menso transformiĝas!

La dua ARMATANO : maltrafi la celon (parenca kun la antaŭa) estas mistradukita kiel "PEKO, PEKI" kaj signifas konsideri nur el la vidpunkto fizika, karna, forgesante la vidpunkton psikologian, spiritan!

Nun vi supozeble ekkomprenas kion signifas ke "ni povas nur fortostreĉi esti KRISTANOJ", ĉar oni rajtus aserti ke fakte ekzistis nur unu konata Kristano : JESUO! kiu kapablis ami eĉ la malamikojn kaj diris : "Disinjoro, pardonu ilin,

ĉar ili ne scias kion ili faras!" Nome, ili tute ne estis konsciaj, sed meĥanikaj estuloj, aŭtomate agantaj!

La 2-a AFORISMO : "Respektu ĉiujn religiojn" klare signifas respekti iliajn fundamentajn instruojn de amo kaj kompreno al ĉiuj homoj. Kaj estas evidente ke vi konfuzas RELIGIOJn kun RELIGIULOJ, kiuj ne ĉiam plenumis la religiajn ordonojn! Se religiulo faras murdon aŭ instigas murdon, li je ne meritas respekton, sed malestimon kaj karceron!

Do, pri ĉi tio mi ne etendiĝos. Kiel vi povas konstati nun, ĉio cetera de vi skribita havas neniun rilaton kun la Esotera Kristanismo!

Se vi deziras enprofundiĝi en la Psikotransformismon, bonvolu legi mian eseon : **Kiel interpreti la Bibliion laŭ psikologia maniero** en SENNACIECA REVUO n-ro 110 de la jaro 1982a.

ALIA BIBLIOGRAFIO troviĝas menciita sur p.35a de L! 69.

Posta skribo : Lingva rimarko : Orientaj Esperantistoj ne uzas la vorton BUDAO sed BUDHO, do kial ne esti unueca kaj skribi BUDHO?! Alia : Ja estas urbo: Monako; alia afer! monaĥo!

Edgard JAMART :

Al S-ro ERGOTO DE BONAERO

Estimata,

Kun granda intereso mi tralegis vian respondon al "Laŭte" pri la dubaj aforismoj, kaj mi analizis viajn argumentadon kaj klarigojn. Tiuj ĉi ne estas konvinkaj.

Mi almetos ke la vorto Kristo, el la greka "khristos" jam esti traduka el la aramea "meschîkhâ".

La vorto esotera rilatas al interna, spirita disvolviĝo. Ĝia esenco mem estas mistera kaj rezerva al disĉiploj. Foje, interpretoj povas esti diversaj. Ofte, majstroj kaj lernantoj imagas posedi la VERON.

Vi asertas ke religioj entenas nur instruojn de amo kaj kompreno. Mi almetas : kiel la Biblio, ekzemple. Kaj se religiuloj aŭ aliuloj plenumis verajn malamajn instruojn?

Estas alia vero, laŭ kiu, ne Dio, sed neperfektaj homoj kreis sektojn kaj religiojn, kaj transskribis mirindajn rakontojn. "La Libro de l'Mormonoj" estas freŝa ekzemplo.

Malgraŭ nia malakordo, mi amike kaj kore salutas vin.

Jakelino :

Rebato al VALO pri teologio

Teologio ne estas scienco, sed, laŭ mia opinio, la rilato inter teologio kaj scienco estas komparebla kun la rilato inter iama alĥemio kaj hodiaŭa ĥemio. Se en pasintaj jarcentoj ĉiuj dirus : "Alĥemio ne estas scienco, do ni ne interesiĝu pri ĝi", oni senigus la homaron je malkovroj gravaj por la hodiaŭa ĥemia scienco.

Mia propra teologio celas komenti la sperton, ke estas en mi emo al harmonio kun la universo, kaj al amo al aliaj homoj. La ekzisto de tia emo en mi estas fakto. Esplori science pri tiu efektive ekzistanta emo estus la tasko de psikologoj kaj aliaj spertuloj pri homaj sciencoj, kiel sociologio, etnografio, ktp.

Bedaŭrinde, en la fino de la 20a jarcento, homaj sciencoj estas ankoraŭ en sia lulilo, dum multe pli evoluintaj estas sciencoj kiel matematiko, fiziko kaj ĥemio.

Kial? Eble ĉar en la 19a jarcentoj raciistoj ignoris ĉion, kio ne estas racia, kaj inventis la dogmon, laŭ kiu la racio estas LA karakterizo de la homa menso, kaj laŭ kiu, konsekvence, oni ne zorgu pri sentoj. Kio estas la konsekvenco de la malkristanigado de nia socio? Ĉu liberpenso? Tute ne! La malkresko de religioj havis kiel konsekvencon la prosperon de kartotiristinoj, astrologoj kaj ceteraj divenistoj, kaj, nun, almenaŭ en Francio, estas deko da diversaj hazardludoj por doni al homoj esperon pri la realigado de ĥimeroj : veto pri ĉevalkuradoj, sporta lotumado, nacia loterio, ktp, ktp, ktp. Ne eblas konduti, kvazaŭ ne ekzistus en la homa psiko ankaŭ aliaj karakterizaĵoj krom la racio : arto, amo, ktp.

Estas scienca konstato, ke por bone farti homo bezonas ne nur panon, sed ankaŭ amon. Sed, tiom longe, kiom ci interesiĝos nur pri racio, ci ne rajtos plendi, ke pri amo interesiĝas teologoj. Tiom longe, kiom ci konsideros, ke mitoj, fabeloj, poemoj, servas nur por la distro de inĝeni-ero laca pro longa matematika kalkulado, la homsciencoj ne povos disvolviĝi, kaj ilin anstataŭos teologio. Laŭ mi, la transiro de teologio al veraj sciencoj, analoga kun la transiro de alĥemio al ĥemio, eblas nur, se oni rezignas pri la raciista ignoro de la neraciaj elementoj de la homa psiko.

Fakte, en la historio de ideoj, periodoj raciemaj alternas kun periodoj, en kiuj oni akcentas pasiojn kaj imagpovon. Se oni rigardas la francan literaturon, oni konstatas jenan

evoluo : la teatristoj de la epoko de Ludoviko la 14a obeis striktajn regulojn kaj ilia doktrino estis, ke oni evitu sekvi siajn pasiojn. Poste venis romantikaj poetoj, kiuj prikantis siajn pasiojn. Poste venis romanverkistoj, kiuj priskribis realisme la francan socion de sia epoko. Poste venis surrealistoj, kiuj donis unuan rangon al la neracia parto de la homa psiko.

Kara Valo, ci estas homo de cia generacio, mi estas homo de la mia. Mi jam klarigis, ke mi konscias pri la influo de mia medio. Ĉiuj homoj estas influataj de siaj medioj, la demando do ne estas, kiu posedas la veron, sed kiel krei harmonion inter tre diversaj homoj.

ERGOTO DE BONAERO :

LA PARALELA PSEŬDO-ESPERANTO... KIU DEGENERIGAS KAJ ĤAOSIGAS ESPERANTON!

En la 1-a kolono aperas substrekitaj la nenecesaj neologismaj duoblaĵoj kaj poezivortaĉoj kaj arbitre registritaj en PIV, kiuj bedaŭrindege malsimpligas Esperanton! Ili konsistigas forĵetendan balaston por tiel savi la "ŝipon" : Esperanto! En la 2-a kolono la korektaj vortoj troviĝas ankaŭ substrekitaj.

VERSOJ EN ESPERANTAĈO (baziĝas sur PIV)

La PIV-aĉa testamento:
en verkaĉoj sen talento
jam ne brilas bonhumor',
sen hu-muro sen fervor'

kaj la sprito restis for';
ĉar forlasis vin ĉi tio,
estas vi homaĉ-specio!

Jen afer' ekonomika,
jen afero plej komika,
ĉar ne estas ĝi klasika,
sed pli ĉuste, mistifika.

Post longa fuma suĉo,
restis cigareda... puĉo!
La afero vin ja ĝenas
ĉar vi tute ne komprenas!

VERSOJ EN ESPERANTO (baziĝas sur PV)

La "Verdkata Testamento"
estas Ŝvarca monumento
por rideto sen hezit'
ĉiupaĝe brilas sprit'

kaj al bonhumor' invit' !;
Se forlasis vin ĉi ecc,
vi ne estas homa speco!

Jen afero ekonomia,
jen afero vere nia
kun klasik' Akademia
por kompreno harmonia.

Post legado de ĉi verso,
ne okazos ŝtatrenverso!
La afero vin ne ĝenas
ĉar vi bone ĝin komprenas!

Certaj, certaj civitanoj
dubis pri la-certaj planoj,
ĉar malcertas la la-certaj
kaprompige plej mallertaj!

Ĉu la nomo Antonino
vin pensigas pri virino?
Viktorino, Ĵakelino,
ankaŭ ne temas pri ino!

PRI LA DIO INCENO AU INCEN-DIO

Se temas pri Incen-dio,
Al kio rilatas tio?
Rilatas ĝi al malbena
farita de l' Di' Inceno!

NE : HAVI 10 JAROJN...

- Havas mi 10 jarojn ie!
- Vi traserĉu ilin tie!
- Ilin trovis mi en poŝo
anstataŭe de la groŝo!

Jen l'orgojlo de l' gargojlo!
Ĝi uzeblas, sed malvirto!

ĈU MONA-KINEJO AU MONAK-INEJO? (*) EN MONAĤINEJO

Monake estas kinejo,
plej stranga mona-"kinejo",
konata kiel kazino,
ne taŭga por monaĥino.

Kurto Poko Kurt-e pokas
ĉar la Kurta poko ŝokas!
Pok'-a sketo, vortis voro,
jen fuŝita la laboro.

Ĉu estas montrado de monstro,
aŭ kio estas de-monstro?

Laŭ-So : la-mento de-voto;
laŭ mi : jen mento kaj voto!

Jen la de-vor' de la ver'
per kaputa komputero !

Iuj, iuj civitanoj
eĉ ne dubis pri la planoj;
Iuj estis la plej spertaj
kaj kelkiuj pli ol lertaj!

Jen Rodolfo Valentino,
certe estis ne virino!
Sed la nomo : Ĵakelina
estas bela nom' virina!

INCENO, DIO DE L' BRULEGO

Parolante pri brulego,
afero foje sen rego.
Al kio rilatas tio?
Al Inceno, fajra Dio!

SED : ESTI 10-JARA!

- Estas mi 10-jara nun!
- Ĝuu do pri via jun',
per manĝeto de kukum'
kaj suĉado de lukum' !

Jen fiero de l' sincero!
Uzu ĝin; ĝi estas virto!

Kion farus la monaĥo
se li loĝus en Monako?
Kaj senmona monaĥino,
ĉu ŝi irus al kazino?

Ja mallonge kaj malmulte
antaŭ ol vortumi stulte!
Bon'-a g-lito sen manĝego,
pli facila estas lego.

Ŝajnas pli trafa la montrado
en elmontrado aŭ demontrado!

Pediko, plendo, piulo :
pedik-plenda fervorulo!

Jen manĝego de labor'
pro difekta komputero !

PROVU KOMPREMI :

Olda pokoldo, trista vorivo,
vora tristoldo, poka oldivo!

- KIO VI ESTAS ?

Ĉu pokoldulo aŭ oldpokulo ?

ĈU EN LA SAMA LOKO ?

Ŝi banis sin en la getto;
kaj ankaŭ li, en lageto!
Kaj kio estas mek-Mekko,
ĉu eble nur kapromeko?

MALTRAFE !

Faroj far Esperantistoj :
blekoj blek Esperantistoj !
Tiel uzi : far, far, far
estas bleki : blek, blek, blek !

MEMORU : PIV estas nur DISKRIMINACIE uzebla. Urgas la publikigo de nova zorge reviziita eldono en kiu devas foresti la balastaj vortaĉoj kiuj duobligas Esperanton, kiaj : sketi, elvokiva, vori, villo; anstataŭ la tradicie uzataj : gliti, elvokpova, manĝegi, vilao! (Vidu Plena-n Vortaro-n!) (Aliaj ekzemploj troviĝas en mia verko : KANTETOJ KARNAVAL-PARADAJ, kaj en : MI AVERTAS - Pledo por nova eldono de PIV sen eraroj - !)

(*) NEDECA VARIANTO :

ĈU MONA-KINEJO aŭ MONAK-INEJO ?

Monake estas inejo,
plej stranga Monak-inejo,
netaŭga por monaĥinoj!
Tie deĵoras putinoj!

BONE SUKCESI :

Pleanasma idiotaflo!
Sukceso ne povas esti malbona;
tiukaze ĝi estas fiasko!

SEN PROBLEMO :

Maljuna malmulto,
malĝoja manĝegemo !

- NU ...

Eble nur maljuna avarulo !

EN LA PRECIZA LOKO

Apud laget' en getao,
estas tre firma firmao!
Kaj la plej bela vilao
en la ĉefurbo Mekao !

TRAPE !

Trafoj de Esperantistoj :
fare de Esperantistoj !
Daŭra trafo : fare de,
ankaŭ per la simpla : de !

KROMAĴO EKSTER LA 2 KOLONOJ

Ja estas urbo : Monako;
alia afer' : monaĥo!
Ĉilanoj loĝas en Ĉilo;
kaj en intestoj, la ĥilo!
Bela himno : la ĥoralo!
Ruĝa kalko : la koralo!
Nerva malsano : ĥoreo;
nomo de lando : Koreo, (PIV!)
kaj la loĝanto : koreano!
La sandalo por japano
havas la nomon : ĥetao;
juda kvartalo : getao!
Eblas droni en la getto ;
ĝi povas esti lageto!
Por fini : Se vi fiaskis bone,
vi certe sukcesi malbone!

La krizo : kiu elirejo ? (vd. L!75)

NUR KELKAJ KONSIDEROJ

Eble mi devus rezigni skribi ĉi-foje. Ne ĉar la sorto de nia planedo ne interesas min. Kontraŭe, ofte mi havas kap-kaj kordoloron, pensante pri ĝi. Sed mi ne estas fakulo pri la temo. Do, mi provos koncize prezenti kelkajn miajn konsiderojn.

Mi ne ekskludas, ke nia Tero iam pereos : ĝi estas planedo inter planedoj, iam naskiĝinta, evoluanta (inta), mortonta. Sed tio povas okazi post miliardoj da jaroj.

Homoj povas detrui ĝin (kaj jam detruas) multe pli rapide. Ĉu estas iuj novaj faktoj, por ke ni iom esperu ?

Kelkaj okazintaĵoj donas iom da espero. Ŝajne realiĝonta kontrakto sovetia-usona pri likvido de mezdistancaj nukleaj rakedoj. Eta paŝo antaŭen en forigo de terura milita arsenalo.

T.n. "paca atomo". Ĉu la homaro tiris lecionon el Ĉornobila katastrofo? Mi konservas suplementon al "L'Express" kun ĉeftitolo : "Le nucléaire est-il condamné?" (n° 8, de la 15a de majo ĝis 11a de junio 1987). Ĝi enhavas tre interesan trarigardon pri la nuklea politiko de multaj ŝtatoj. La rezulto de la Ĉornobila leciono : 5 landoj (Aŭstralio, Aŭstrio, Danio, Grekio kaj Filipinoj) decidis rezigni la nuklean energion; 10 landoj (Usono, Finnlando, Italio, Nederlando, Svedio, Svisio, Belgio, Hispanio, FRG, Granda Britio) malgrandigis sian nuklean programon. Nur tri landoj nenion modifis : Francio, Sovetio, Japanio. Estas, eble, ne tre konvene paroladi pri iu gradado de danĝero, se temas pri atomcentraloj. Tamen mi eldiras mian opinion : plej danĝeras la sovetiaj atomcentraloj, ja en Sovetio okazis kuniĝo la plej terura el ĉiuj eblaj : totalismo kaj la nuklea energio. Feliĉe, kuŝ nova ĝenerala sekretario dse KPSU k-do M. Gorbaĉov falis multaj tabuoj (kvankam lia konduto dum postĉornobilaj tagoj estis hontinda. Mi rememorigu unusolan fakton : la katastrofo okazis la 26an de aprilo '86. K-do Gorbaĉov elpaŝis per-televide la 14an de majo! Kie li kaŝiĝis de siaj samlandanoj dum 18 tagoj? Jes, li ĉeestis la Unuamajan paradon en Moskvo, kvazaŭ nenio okazis! Same - miloj da kievanoj paradis tra Kievaj stratoj - kvazaŭ nenio okazis). Sed vek-iĝis post longa gelo la sovetia loĝantaro (same en Francio

kreskis la rangoj de ekologiistoj). La mito de "ĉiopova atomo" definitive estas for. En Sovetio aŭdiĝas la unuaj protestoj kontraŭ konstruo de novaj atomcentraloj. La 6an de aŭgusto 1987 "Literatura Ukrainio" (tiu sama, kiu ĝuste unu monaton antaŭ la katastrofo alarmis pri malordo en Ĉornobila atomcentralo - artikolo de L. Kovalevska "Ne privata afero", 27an de marto '86) publikigis avertan artikolon pri danĝero de konstruo de nova atomcentralo apud u. Cihirin ĉe Dnepro. Nun oni kolektadas protestsubskribojn. Do, malrapide, sed la publika opinio evoluas, en Sovetio, ankaŭ en Francio kaj Japanio. Demando : ĉu necesa konsciigo pri la problemoj ne alvenos tro malfrue?

Mi konsentas, ke Okcidenta Eŭropo troviĝas en "rompiga periodo". La situacio estas tia, kiun homaro ankoraŭ ne konis. Ekzemploj por sekvi ne ekzistas. Sovetio kaj satelitaj landoj - t.n. "monda socialisma sistemo" - estas landoj subevoluintaj (malgraŭ kosmaj flugoj! Oni sendas homon en kosmon, jes, sed sur kampoj miloj da homoj manlaboras kaj ofte iliaj labor- kaj vivkondiĉoj nemulte diferencas de tiuj en la Tria Mondo).

Plia rimarko : malsatego en Etiopio ne estas nur rezulto de sekeco. Pri fireĝimo de k-do Mengistu tre prave atentigis Valo en siaj "Bezonoj kaj rimedoj", L! n-ro 71. Bedaŭrinde, malsatigo de loĝantaro estas unu el la 20-jarcentaj horor-eltrovaĵoj kiel metodo de totalisma reĝimo (rememoru malsaton de la 1933a jaro en Ukrainio, Centra Rusio kaj Norda Kaŭkazio. En la nura Ukrainio ĝi forportis 6 milionojn da homaj vivoj*.

Milionoj da homoj antaŭ l'okuloj de la tuta mondo, sed oni ne aŭskultis tiujn, kiuj denunciis la kriman reĝimon. Pli volonte oni aŭskultis la tiaman francan ministron Eduardon HERRIOT (malbenata tra tuta Ukrainio!) vizitintan la landon kaj deklarintan, ke neniun malsaton li vidis. Sed eblis kaŝi (kaj kiel sukcese kaŝi!) malsategon en la 1933a jaro, ne eblas fari similan en la 80aj jaroj de nia jarcento. Do, mondo

Vidu libron de la angla specialisto Robert Conquest "The harvest of sorrow: Soviet collectivization and the terror-famine, London: Hutchinson Press, 1986) (titolo: "Rikolto de senespero")

estas almenaŭ informata. Kaj diversspecaj registaraj kaj ne-registaraj organizaĵoj venas helpi. Priparolindas la demando: kiel helpi, ja klaras por ĉiu ke malplenigo de siloj kaj fridoŝrankoj de Eŭropo estas nur portempa solvo, kaj neniukaze - definitiva. Ankaŭ : kiel helpi la malsatantan loĝantaron, ne helpante samtempe kriman reĝimon surloke? - jen la demandoj, kiuj rodas kapojn de multaj eŭropanoj.

Kiel la Okcidenta Eŭropo solvos siajn nunajn problemojn? Mi ne havas pretajn receptojn. Verŝajne, solvo kuŝas en disdivido de laboro, en pli intensa helpo al la Tria Mondo, en kunlaboro kun Sovetio kaj aliaj landoj de la Orienta Eŭropo (kondiĉe ke ili demokratiigu!). Mi lasas pli kompetentajn homojn esprimi sin pri pli konkretaj paŝoj. Tre volonte mi aŭskultus niajn afrikajn laŭtulojn. Ĉu, eble, iu el ili eniros ĉenon de diskutemuloj ?

Oksana.

Aldono al historio de la 20a jarcento. Fragmento el romano "Ĉio pasas" de la rusa verkisto Vasil Grossman (1905-1964) :

"Mi memoras, iu maljunulo alportis gazetpecon, li trovis ĝin sur fervojreloj. Tie troviĝis artikoleto : alveturis franco, fama ministro, kaj oni veturigis lin en Dnepropetrovskan regionon, kie terura malsato estis, eĉ pli terura ol ĉe ni, tie homoj homojn manĝis, kaj jen en iun vilaĝon oni lin alveturigis, en kolĥozan infanvartejon, kaj li demandis : "Kion vi hodiaŭ tagmanĝis?" La infanoj respondis : "Kokinan supon kun bulketoj kaj rizajn buletojn". Mi mem legis, kiel nun vidas tiun gazetpecon. Kio do estas? Oni mortigas silente milionojn da homoj kaj la tutan mondon trompas. Kokina supo - skribas! Rizaj buletoj! Kaj ĉi tie oni ĉiujn vermojn formanĝis. La maljunulo al kolĥozestro diris : "Dum caris Nikolao, tra la tuta mondo pri malsato oni kriis : "Helpu, kamparanaro pereas!". Sed vi, herodoj, spektaklon preparis!"

Oni diros : "Jes, en la 80aj jaroj de la 20a jarcento ne plu eblas kaŝi malsaton. Sed pro tio ja malsato ne iĝas malpli terura. Do, magra konsolo." Jes, magra!

Lastatempe en Sovetio mem finfine ekaperis artikoloj pri malsateco! Antaŭe tio estis nur "kalumnioj de burĝaj naciistoj" !

Mi pripensis aferon, kiun mi regule renkontas en mia laboro kaj kiu koncernas la virinan laboron. Fakte, mi laboras en metiinstruado por plenkreskuloj (AFPA) kaj pluraj el miaj gelernantoj estas virinoj, kiuj aŭ prizorgis siajn infanojn dum kelkaj jaroj kaj volas aŭ devas labori aŭ kies edzo forlasis ilin aŭ mortis kaj kiuj ne plu estas sur la labormerkato sufiĉe lertaj kaj eĉ foje neniam havis metion.

Mi lastatempe travivis kelkajn novajn spertojn, kiuj vigligis ĉe mi la opinion, ke ĉiam necesas, ke la virinoj laboru (escepte, kiam eblas, kelkajn malmultajn jarojn kiam la infanoj estas junaj, kaj tio estas eĉ pridubinda...!) Tio verkigis al mi poemeton. Ĉu vi konas iun al kiu mi povas min turni por peti konsilojn pri tia verkafo?

VIRINLABORO

Ekstere kaj hejme certe
Virinoj ja, laboradas.
Certaj diras, serioze,
Nu, ĉu ili do bezonas
Tiel fari, kiam ĉie
Viroj lertaj senlaboras?
Konvinkite, kelkaj mire
Ekpripensas, tuj imagas:
Ja la infan', patrin' hejme
Multe ĝojas, kaj feliĉas!
Oni svarmas kaj konsile
"Virinoj tuj, nur patrinas,
For de l' labor'! familie!"
Momente ja, mi konsentas
Jaroj pasas, kaj finfine
Kreskas infan', nun studadas;
Mono mankas, kaj subite
Al ŝi turnas, edzo petas
Ke ŝi helpu, sed surkampe
Ne plu lertas, lerni devas.
Malfeliĉe! Eĉ kelkfoje
Edzo ŝurtas kaj foriras.

Kun la infan' patrin' hejme
Ne plu scias, ĉien krias
Sen salajro kaj senrajte.
Kaj la edzo eĉ ne pagas
pensionon, senkulpege
Ho kedu min, ja mi konas
Multajn inojn, ĉiutage,
Kiu sekvis kaj malbenas
La konsilojn, vidu supre.
Kaj mi diras, eĉ ekkrias,
Ho virinoj, singardeme,
Nur laboru, al vi flustras
Petu helpon, dispartige
Hejmlaboron, vi devegas
Pensi al vi, estontece.
Almenaŭ vi tuj povas
Al la edzo, tre prizorge
De li peti, mi konsilas,
Bonan ilon, tuj protekte
Kun garanti' kaj vin ŝirmas.

TEREZA.

Noto de la red.: La red. volonte transsendos la respondojn al tiu ĉi supra peto. Antaŭdankon!

Mi kelkfoje estas profunde kortuŝita, legante skribaĵojn aŭ artikolojn, kiuj aperas en diversaj revuoj, gazetoj, bultenoj pri la situacio en Afriko. Kvankam la asertoj ne estas tute veraj, ekzistas iaj veroj, kiuj ofendas.

Ni, Afrikanoj, estas ĉiuj ofendataj vidi, ke nur nin severe punas malsatego, ke ĉe ni oni trovas malfirmajn registarojn, la plej multajn rifuĝintojn de diversaj kategorioj, la plej altan mortoprocenton inter ĉiuj kontinentoj, la plej malriĉajn homojn el la tuta homaro.

Mi estis profunde kortuŝita, kiam mi legis la artikolon de Nzaniye Bernard "Respondas Tanzania esperantisto", kiu aperis en la bulteno "Irlandafrika esperantisto", kie Japano demandis lin, ĉu ekzistas vere E°-grupoj, kiuj ne kapablas aĉeti librojn, kasedojn, ktp.

Stranga demando por Afrikanoj, eĉ eble ĝena aŭ ironia, tamen neimagebla kaj eble miriga afero por Japano.

Eble la Japano ne estas la sola esperantisto, kiu sin demandis pri tio, sendube estas aliaj. Laŭ mi, ili pravas kaj mi komprenas ilin... ĉefe se ili neniam estis en Afriko.

Kelkfoje okazas, ke ni bezonas ion por la bona funkciado de nia klubo en Maendeleo; eĉ la kotizoj de la anoj ne sufiĉas por tio; sekvas diskutado, kiu finiĝas sen kompromiso: kelkaj preferas peti helpon de aliaj esperantistoj, kelkaj ne volas, ke oni faru tion.

Tiuj lastaj ne volas, ke oni petu, ĉar daŭra petado kaŭzas honton. Fakte, sed ankaŭ ni posedas nenion kaj E° devas kreski ĉe ni.

Ekzempleto: oni ĵus havis en nia klubo la ideon aperigi informbulteneton, kiu aperus trifoje en la jaro, en la svahila lingvo kaj parte en facila esperanto por propagandi apude. Ni provis taksi la kostojn sed estis multekoste (almenaŭ 2500 ŝilingoj por ĉiu numero). La klubo petis min esplori kiel realigi tiun projekton.

Mi pripensis sed vane kaj mi revenis al la sama konkludo: necesas helpo! Tial stagnas la projekto kaj plue stagnos, se la eksterlandaj esperantistoj ne helpos nin. Sed kiam oni nin helpos? Mi ne kapablas respondi, ĉar tiu demando tuŝas kampojn, kie mi ne havas sperton.

Niaj registaroj jam ŝuldas 200 miliardojn da dolaroj. Sen tiu prunto, ĉiuj grandaj projektoj ne estus efektiviĝintaj kaj la krizoj en Afriko ja estas ofte pli sentataj de la popol-

aĉo ol de la aliaj kategorioj de la loĝantaro. Popolaĉo estas la kamparanoj, laboristoj, senlaboruloj, instruistoj, studentoj, rifuĝintoj, ktp.

La restarigo de la situacio ne okazos morgaŭ. Unu el la ekspertoj de la "Unuiĝintaj nacioj" ĵus diris, ke en la jaro dumila, Afriko havos 640 milionojn da loĝantoj, dum mankos 100 milionoj da tunoj da manĝaĵoj ĉiujare.

Do estos grava problemo pri nutrado. La Afrikanoj unue solvos tiun malfacilan problemon kaj poste pripensos aliajn aferojn, kiel la lernadon de lingvo. Sed ne estas facile solvi la problemon pri nutrado, oni devos konstante okupiĝi pri tio kaj tiel rezigni pri la aliaj aferoj.

Evidente, tio ne estas nun nia problemo sed nia japana samidano jam sciis, ke estas E-grupoj, kiuj ne povas pagi librojn, nek aliajn esperantaĵojn. Eĉ la aliaj esperantistoj jam tion sciis, mi estas certa.

Mi prezentis al ili mian peton pri mia projekto!

Lutombo Yogolelo

Maendeleo E°-klubo, P.O.Box 1065, Tabora/Tanzanio

Ĉu esperanto estos bonakceptata en Afriko ?

(fino de p. 2)

aŭ de la protektanto por pravigo de la politiko aŭ ekonomio. Humanismo ne estas grava afero. La homoj sin komprenu aŭ ne, ili sin interhelpu aŭ ne, tio ne estas grava afero, la esenco estas firmteni ĉe la socia pozicio, kiun oni okupas, la esenco estas bone manĝi kaj sin amuzi.

Kiu el niaj aŭtoritatuloj dirus, ke li neniam aŭdis pri la esperanta lingvo? Neniu, mi pensas, tamen ŝajne oni ignoras ĝian ekziston, eble oni eĉ batalas kontraŭ ĝi, nur por protekti siajn profitojn. Kia honto!

Tiel, en tiu kurado al la profitoj mi demandas min, ĉu esperanto povus elteni kaj daŭri. Tamen ĝi estas devigata elteni kaj kreski inter ĉiuj tiuj malhelpoj.

Laŭ mia vidpunkto, la grava laboro koncernas e-istojn, kie ajn ili restas en tiu mondo. Ili devas scii tiun veron kaj ankaŭ scii, ke ili devas serĉi la solvon de la eventuala problemo, kiun esperanto povas renkonti. Gejunuloj, gemaljunuloj, registaroj, specialistoj pri diversaj fakoj, ni ĉiuj estas koncernataj de la disvastigo de esperanto. Ni interhelpu nin per tiu laboro, ni eĉ helpu la afrikajn registarojn. Ni fidus en via agado kaj via subteno malgraŭ la multaj malhelpoj, ĉefe ĉi tie en Afriko, kie la malhelpoj estos sendube grandaj sed E° devos kaj povus kreski kaj triumfi ankaŭ ĉi tie.

Nia originala rakonto :

La bela historio de Viktoro savanto de hundoj

Atentigo de la aŭtoro

Tiu ĉi teksto troviĝas mezvoje inter novelo kaj psikologia eseo. Mi redaktis ĝin kiel eble plej sobre. Mi forigis la literaturajn artifaĵojn, la longajn priskribojn por nur raporti la disvolviĝon de la faktoj kaj ties sekvojn.

Teksto, kiel ĉiuj kiujn mi verkas, por ebligi pripensi. Emocia teksto kiun oni ŝatus relegi la tagojn kiam oni dubos, kiam oni malesperos kaj kiam necesos alroĉiĝi al fikcio, kiu estus povinta esti realaĵo.

Ĉiuj miaj roluloj vere ekzistis, eĉ se ili ne estis tiuj herooj : ili estus povintaj esti aŭ ili estus dezirindaj esti ; malfeliĉe ili ne vivis kune aŭ samtempe. Mi konis ilin unu post la alia kaj mi paroligis ilin aŭ divenis ilin per mia speciala psikanaliza metodo.

Eble kelkaj el ili sin rekonos kaj al ili mi dediĉas tiun verkon, kaj samtempe al ĉiuj venkitoj de la vivo, por kiuj restas nur revoj kiel memoraĵoj.

La Situo

Imagu urbeton trafluatan de rivereto. La tuta agado okazas ĉe la dekstra bordo. Suprenirante la deklivon oni renkontas la urbodomon, la lernejojn, la stacidomon, kaj poste avenuon flankitan de riĉaj domoj, kies ĝardenoj aŭ parkoj estas ĉirkaŭfermitaj de muroj kovritaj de hedero. Nur en kelkaj lokoj rozoj aŭ visterioj pligajigas la vojradon.

Je ĉirkaŭ 800 metroj de la stacio troviĝas la Uzino. Poste, je la fino de la deklivo, ĉe la dekstra flanko estas senlireja vojo bordita ĉe nur unu flanko per duetaĝaj domoj, ĉiuj samaspektaj, sen ornamaĵoj. Kiel ĝardenoj, nur tapiŝo el skorioj, nenia arbeto, nenia floro.

Tiuj domoj apartenas al la uzino, kiu loĝigas tie siajn laboristojn, kies laboro estas ne multe profitdona.

Ĉe la enirejo de la vojo estas benko kaj ĉe la fono malnova hundodometo forlasita.

Pli poste estas la plataĵo, la deklivoj malproksimiĝas ambaŭflanke. La vojo ne plu estas gudrita. Maldekstre troviĝas la malnova ŝtonminejo ; iom pli poste, dekstre la pavilono de la familio de Viktoro kaj, sufiĉe malproksime, maldekstre, tiu de la "Grandulo", la pli aĝa kamarado de Viktoro.

La Agado

Ĝi situas mezvoje inter la du mondmilitoj. Tiam la infanoj ripozis jaŭde anstataŭ merkrede, la lernejoj transportoj ne ekzistis kaj la malgranda

Viktoro devis piediri kvarfoje tage la du kilometrojn de sia domo al sia lernejo.

La roluloj

Viktoro, 7-jara, komencanta lerneĵano.

La "Grandulo", ĉirkaŭ 15-jara, tre bona amiko kun Viktoro ĉe la kamparo, sed fiera ekde kiam li estis ĉe la urbeto.

Brigita, 6-jara, lamulineto, miopega, filino de gedrinkuloj, kaj kies patrino mortis. La patro laboras ĉe la uzino, kaj ili loĝas en la lasta domo de la senelireja vojo.

Aliaj roluloj malpli gravaj estos priskribitaj la ĝustan momenton.

Mi lasas al la legantoj la zorgon imagi ilin laŭplaĉe laŭ miaj malmultaj donitaĵoj.

* *
*

Unua parto

Viktoro estis apenaŭ 50-jara kaj li ĵus perdis sian kunulon ; oni enterigis ŝin meze de la posttagmezo.

Kelkaj malnovaj kamaradoj venis kaj foriris. Sola, li vagis tra la kamparo, sur la vojetoj, kie li ofte promenis kun Brigita, malproksime de la multe trapasataj lokoj. Poste li re-enhejmiĝis, malkuraĝigita, sen energio, li eĉ ne deziris manĝi aŭ trinki ion, kaj, same kiel en sonĝo, li revidis sian infanaĝon, ekde la lernejo kie, la duan tagon, kamarado frapis lin per pugno kaj diris al li : "Defendu cin!". Mirigite, li ne komprenis kial li devas sin defendi, kial tiu terura ludo, kiam ĝi ne necesis. "Se ci ne defendos cin, ni ĉiuj agresos cin!"

Tiam Viktoro pensis pri sia granda kamarado, tiu kiu promenigis sian hundon. Li akompanis ilin kelkfoje dum momento, sed la Grandulo evitis lin en la urbeto; li ne komprenis kial kaj li demandis tion al li.

"Por iri kun la granduloj, necesas ne timi. Se ci volas veni kun mi, necesas al ci alpreni gravan decidon, mi estas certa ke ci timos!"

"Tamen diru!"

"Ci konas la ŝtonminejon?"

"Jes, sed estas malpermesate eniri, miaj gepatroj ja diris al mi tion, estas tre danĝere!"

"Mi iras tien."

"Ci iras ĉe la bordo de la truoj?"

"Ne tro proksime tamen, sed sufiĉe por pisi meze de la akvon!"

"Kaj ci ne timas? Oni neniam punis cin pro tio?"

"Ne, temas bone scii kie la danĝero troviĝas ; se ci tro alproksimiĝas kaj ke ci falas en la truon, ci estas nesavebla. Venu!"

Li transpaŝegis la ĉenon, kiu fermis la enirejon kaj Viktoro transpaŝis sube, flanke, kie ĝi estis pli alta. Kiam oni alvenis ĉe vojkurbo, la du truoj estis videblaj, du specoj de putoj, kies vandoj estis preskaŭ vertikalaj. Estis akvo je pli ol unu metro de la grundsurfaco. La blua ĉielo vidiĝis sur tiu akvo : estis same kiel du bluj okuloj.

La Grandulo prenis la manon de Viktoro, tiun malgrandan manon, kiu iomete tremis, kaj li kondukis lin antaŭ la unuan puton.

"Ĉi tie ci riskas nenion kaj ci estas sufiĉe proksime por direkti cian ŝprucaĵon ĝis la truo. Mi iras al la alia sed mi deziras aŭdi cian pisaĵon fali, same kiel ci aŭdos la mian!"

Viktoro angoris, li rigardis la Grandulon foriri, ŝajnis al li ke la bruoj estis egaj. Li estis tro kunstreĉita por pisi. Li aŭdis la bruon de la Grandulo kiu kriis al li : "Ci aŭdis? Al ci nun !" Tiam, kunigante ĉiujn siajn fortojn, Viktoro respondis sen tremi : "Mi aŭdis, sed mi ne bezonas!" Je tiu momento, ĉar li parolis, tio malstreĉis lin, li ellasis kelkajn gutojn kaj ŝprucon kiu iris ĝis la puto. Estis ĝustatempe, sed estis sukceso.

"Brave! Mi vidas ke ci estas inda iri apud mi, ci venis spite al la malpermeso kaj ci pisis en la truon! Se aliaj knaboj tedos cin, diru tion al mi, kaj mi parolos al ili. Mi estas certa, ke multaj ne estus tiel kuraĝaj kiel ci!"

Sed survoje, la Grandulo diris al li, ke por esti vere grandulo, necesus alpreni du aliajn decidojn kontraŭ la volo de la aliaj, sed ke li ankoraŭ ne sciis kiujn, nur ke tio ĉiam funkciis per 3.

*

Tiun jaŭdon, Viktoro iris kun la Grandulo por la promenado de la hundo kaj li demandis lin ĉu li jam estis alpreninta siajn tri decidojn kaj pri kiaj temas. "Mi jam alprenis la duan kaj estas por la hundo. Miaj gepatroj ne deziris hundon kaj mi havis kamaradon, kies gepatroj intencis dronigi ties hundon en la ŝtonminejon se neniu dezirus ĝin. Mi kondukis la hundon hejmen. Mia patrino kriis kaj ordonis al mi rekonduki ĝin tien, kie mi prenis ĝin. Tiam mi emfazis, ke mi ne savis ĝin por forĵeti ĝin al la akvo! Pli serena, ŝi petis de mi klarigojn. Mi konfesis ke mi iris de tempo al tempo al la ŝtonminejo, mi aŭdis ĝemadojn:

tiu hundo estis alkroĉita ĉe ŝtona elstaraĵo, kaj la malfeliĉulo ne kapablis longe elteni. Mi prenis bastonon kaj, kuŝante sur la grundo, kun ŝultro kontraŭ rokpeco, mi prezentis la lignaĵon al la hundo, kiu prenis ĝin per siaj dentoj kaj tiamaniere mi povis helpi al li supreniri ekster la puton.

Tiel, antaŭe malbona knabo, mi fariĝis heroo kaj kompreneble ne plu temis pri forĵeto de la "atestanto" de mia heroaĵo, pri kiu la konataro de mia patrino ofte aŭdis."

Viktoro longe pripensis kaj diris : "Do, ĉi estas heroo pro tio ke ĉi mensogis!" " - Jes, sed necesas bone fari tion, esti certa pri si mem, la afero devas esti bone antaŭvidita kaj la celo de la mensogo estu valora : mi ne mensogis por mi, sed por la hundo. Eble liaj mastroj neniam estus irintaj ĝis la mortigo de tiu besto, sed oni ne povas scii..."

*

Viktoro estos baldaŭ 13-jara knabo, bona lernanto, sufiĉe saĝa kiel decas kiam oni estas filo de uzina submastro. La Grandulo foriris al la ĉefurbo kaj li venas nur por la jara libertempo. Lia hundo mortis.

Ĵaŭde Viktoro iras al la subĉiela vendejo aĉeti por sia patrino. Ĉe la reveno, li haltas momenton por sidi sur la benko de la senelireja vojo.

Tiam Brigita, kiu vagas la tutan tagon tra tiu vojeto, alkuras por paroli kun li. Ŝi forte lamas, sed ŝi havas belajn bluajn okulojn; domaĝe, ŝi ne bone vidas ; ekde du metroj, ŝi vidas la aĵojn nur kvazaŭ tra nebulo. Iufoje, oni metis okulvitrojn sur ŝian nazon, sed ŝi diris ke la aĵoj ne estas sufiĉe belaj, ŝi pli ŝatas imagi ilin laŭ sia propra fantazio.

Tiun tagon, kiam ŝi montris siajn akvarelojn al Viktoro, lia patro, kiu estis sendita de la mastro por iu afero, vidis ilin kune. Vespere, hejme, li rakontis tion al sia edzino, kiu diris malŝate : "Mi esperas, ke li ne venigos 'tion' ĉi tien!". La patro respondis : "Ne, li havas multe pli bonan!" kaj li flustris nomon al sia edzino, kiu diris laŭte : "Ŝi kreskis tro rapide, jam estas virineto, kaj Viktoro estas nur knabeto!" Viktoro, kun la nazo direktita al sia telero, estis ĝenata: tie kuŝis la tikla punkto, ĉar je la momento kiam Brigita montris al li siajn akvarelojn, Erika deziris paroli al li, sed vidinte ke li estas kun Brigita, ŝi daŭrigis sian vojon, kvazaŭ sen atenti pri ili. Tiam li ekvidis ŝin kaj kuris post ŝi. Ŝi diris al li : "Ĉi povas resti kun ĉia tordulino, ĝuste mi intencis diri al ĉi ke ni ne povos akordiĝi kaj ke ĉi estas libera serĉi

alian fianĉinon!" Viktoro konsterniĝis. Li ja antaŭvidis malakordiĝon, sed esti forlasita tiamaniere, traktita kiel kulpulo, estis al li neelteneble, kaj, ĉar Erika rapide foriris al la urbo, li eĉ ne povis diri iun vorton por senkulpigi sin. Lia kolero direktiĝis kontraŭ Brigita, kiu ankaŭ estis malaperinta.

*

Brigita estis vere talenta por desegni. Iun tagon, kiam, per peco de gipso, ŝi desegnis sur lado kiu kuŝis sur la grundo, juna najbaro diris al ŝi : "Ĉi bele desegnas! Ĉi devus fari tion sur papero kaj per koloroj." " - Mi ne havas tion!" " - Mia avino donacis al mi skatolon por akvarelo, sed mi ne ŝatas tiun amuzilon; se ĉi dezirus ĝin, mi estas preta doni la tuton al ĉi." Kaj, sen atendi respondon, li vokis sian patrinon por peti la permeson kaj por montri al ŝi la desegnaĵon de Brigita. Per tiu helpo, ŝi komencis karieron de akvarelistino.

Unue ŝi desegnis la senelirejan vojon, sed ŝi ŝanĝis la formojn, la kolorojn, aldonis balkonojn, arbetojn, dirante ke, per sia imago, ŝi "vidis" tion tia, kia ĝi devus esti.

En tiu vojo, neniu estis riĉa, sed kelkaj najbaroj sukcesis vendi akvarelojn por aĉeti paperon kaj kolorojn. La lernejo aĉeti por ŝi desegnan metodon kaj, la sekvantan jaron, organizis ekspozicion, kie ŝiaj akvareloj estis tre favore rimarkitaj.

*

Tiun ĵaŭdon Viktoro estis tre ŝarĝita de provianto. Brigita atendis lin sur la benko, kun sia akvarela skatolo sur la dorso kaj ŝi diris al li : "Mi akompanos ĉin, mi deziras desegni ĉian domon." Estis kvazaŭ tondro. Viktoro havis ankoraŭ en la oreloj la vortojn de sia patrino : "Mi esperas ke li ne venigos 'tion' ĉi tien!" kaj li mem diris pri ŝi : "Kiam mi trapasas, ŝi ĉiam estas post mi, kiel perdita hundo!" Ne devus okazi, necesus eltrovi ion; sed ŝi sekvis lin. Li ne povis kuri, li estis ŝarĝita kaj li ŝajne estus fuĝanta, ne! Li vidis la enirejon de la ŝtonminejon kaj li pensis : "Ŝi timos, mi diros al ŝi atendi min ĉi tie kaj mi fuĝos malantaŭen." Sed ŝi estis obstina kaj ŝi paŝis sub la ĉenon.

Kiam ili alvenis sur ebena kaj alta parto, de kie oni povis vidi la du truojn, montrinte ilin al ŝi, li proponis sidi tie ĉi dum li iros al la alia ekstremaĵo. Ŝi akceptis, sed ŝi petis lin

ke li lasu sian sakon apud ŝi! Tiu malgrandulino estis vere ne obeema : vera perdita hundo! Kaj kolero ekinvadis lin, freneza penso fulmis tra lia cerbo : ĵeti ŝin en iun el la du truoj! Oni pensus, ke ŝi mem falis tien, oni ne suspektus lin. Neniu vidis ilin eniri en la ŝtonminejon, estis tiom malmulte da personoj sur tiu strato.

Li diris al ŝi : "Venu!". Ŝi donis al li sian manon kaj ili haltis je nur unu metro de la unua truo. Viktoro provis pripensi. Liaj pensoj tiel multe interpuŝiĝis, ke estis kvazaŭ ŝtormo en lia kapo. Je tiu momento Brigita ekdirektis la ofensivon : ŝi alproksimiĝis de li kaj kisis lin. Estis terura ŝoko. Viktoro havis impreson, ke ĉio renversiĝis ĉirkaŭ li, ke la koloroj ŝanĝiĝis. Kiel do! Estis la viktimo kiu kisis la ekzekutiston! Estis sufiĉe por frenezigi. Brigita estis kvietita, ŝi konservis sian ĉirkaŭpremon, sed iomete malproksimiĝis sian vizaĝon.

Viktoro komencis kompreni kaj li diris : "Ci ne timas?" " - Ne kun ci!" "Sed ĉu ci scias ke ci ĵus eskapis grandan danĝeron? Mi intencis ĵeti cin en la truon!" " - Mi sciis tion, sed mi estus alkroĉinta min al ci kaj ni estus irintaj kune ĉe la fundon de la truo!" Estis tro por la nervoj de Viktoro, kiu ekploregis. Brigita kisis lin denove, sed ŝi ne diris iun vorton plian : ŝi sciis silenti kiam estis necese.

Viktoro rekvietiĝis kaj li pensis pri la tri decidoj, kiujn li devis alpreni dum sia vivo : estis ja tio. La dua de la Grandulo estis la savo de la hundo; la dua por li estos akcepti la amon de Brigita, la mokaĵojn de siaj gekamaradoj, la kriojn kaj riproĉojn de siaj gepatroj. Li estis preta fari eraron, sed li ekriparos ĝin kaj li diris al Brigita : "Nun ni iru hejmen kaj mi petos de mia patrino, ke ci venu ĉiujn ĵaŭdojn kaj kiam ci dezirus : la malbona Viktoro kiu certe multe ĉagrenis cin, ne plu ekzistas. Venu!"

*

Kiam ili estis videblaj de la domo, la patrino de Viktoro, kiu komencis malkvietiĝi, venis al ili por preni la provianton. - "Patrino, ĉu ci permesas, ke Brigita desegnu nian domon kaj ke ŝi montru al ci siajn akvarelojn?" - "Jes, sed vi devas esti malsataj, estas malfrue!" - "Ho, mi bone manĝis hodiaŭ matene kun paĉjo... por la tuta tago!" diris Brigita rigardante siajn ŝuojn. "Sed, ci havas nenion por tagmezo?" - "Ne, ĵaŭde forpasas rapide; aliajn tagojn mi tagmanĝas en la lern-

ejo." Viktoro aldonis : "Matene, kiam ŝia patro foriras al la uzino, li ŝlosas la pordon kaj ŝi restas la tutan tagon ekstere, tiam se ci bonvolus, ŝi povus veni ĉiujn ĵaŭdojn : sola, ekstere povus okazi al ŝi akcidento." - "Sed kiam pluvos?" diris la patrino. "Ho! estas simple, estas malnova hundodometo, kovrita per gudrita papero. Interne estas ligna pajlo kaj gazetoj. Estas amuze rigardi la pluvon fali ekstere. Kaj kiam estas tro malvarme, se mi komencas frostiĝi, mi iras ĉe najbarinon." La patrino de Viktoro konsterniĝis; ŝi ne pensis, ke tia mizero povus ekzisti, tiam Viktoro insistis por la aliaj ĵaŭdoj. Lia patrino demandis al Brigita : "Ĉu ci neniam havis malagrablaĵojn kun aliaj personoj?" - "Jes ja! diris Viktoro, malbona knabo volis ĵeti ŝin en truon de la ŝtonminejo!" kaj Brigita aldonis : "Sed Viktoro ĉasis la malbonan knabon!" Viktoro reĝustigis : "Ni kune ĉasis lin!"

Mi ne scias ĉu la patrino de Viktoro komprenis, sed ŝi foriris en la kuirejon por ordigi siajn ideojn kaj ŝi neniam plu faris demandojn pri tiu temo. Eble ŝi pensis pri tiu terura frazo, kiun ŝi diris rapide, sen pripensi, kaj pri sia morala respondeco okaze de dramo. Feliĉe, tiu lamulineto devis esti superinteligenta kaj ŝi sukcesis eviti la plejmalbonon.

*

Du jarojn poste, la patro de Brigita eniris malsanulejon kaj mortis post kelkaj monatoj. Por liberigi la domon, ŝi foriris ĉe la gepatrojn de Viktoro, kiuj disponigis por ŝi la ekstran ĉambron, ĝis kiam ŝi kaj Viktoro estos en aĝo geedziĝi.

Ŝi lasis la meblojn, ĉar ŝi ne sciis ĉu ili estis posedaĵo de ŝia patro. Ŝi forlasis la lernejon ĉar ĝi estis tro malproksima kaj por helpi la patrinon de Viktoro kaj daŭre desegni.

*

*

Post la geedziĝa ceremonio en la urbodomo, denove hejme, ili trovis antaŭ la pordo grandan keston da libroj kun banderolo : "Por geedziĝa donaco". Supre kuŝis dika koverto same anonima, kiu entenis grandan sumon en biletoj.

La libroj venis verŝajne de la Grandulo kaj de Erika, kiuj geedziĝis la antaŭan jaron kaj kiuj havis gravajn postenojn en eldonejo.

La mono verŝajne estis de la uzina mastro, kiu loĝigis kaj dungis la patron de Brigita dum multaj jaroj, kaj kies submastro estis la patro de Viktoro. Tiu lasta jam komencis

labori ĉe diversaj postenoj por esti kapabla anstataŭi sian patron.

*

Dum kelkaj jaroj la vivo kviete fluis. Kiam la patro de Viktoro atingis la emeritecan aĝon, li decidis foriri al la sudo, kie li heredis malgrandan farmobienon kaj por lasi al ili la tutan domon.

Viktoro sukcedis al sia patro en la uzino kaj Brigita havis kelkajn gelernantojn por la desegnado, inter kiuj instruistino kiu retrovis tie unu el siaj eks-lernantoj, kaj ĉiujfaŭde estis ankaŭ simpatiaj kunvenoj, kie oni interŝanĝis librojn, poŝtkartojn, poŝtmarkojn kaj eĉ ideojn.

Sed Brigita ne bonfartis. Ŝia alkohola deveno postlasis spurojn. Unue ŝi havis pulmajn malagrablaĵojn : ŝi estis trafita de pleŭrito post pentrado de neĝa pejzaĝo.

Kvardekjara, ŝi komencis havi nervajn krizojn nokte. La kuracisto komprenis nenion pri tio. Li proponis, ke ili havu apartigitajn litojn por sekureco kaj tiu decido eble estis kaŭzo de ŝia morto.

*

La posedanto de la uzino mortis kaj liaj filinoj ne volis entrepreni modernigadon. Ĉar neniu aĉetanto montriĝis, estis la urbeto kiu aĉetis la uzinon por malkonstrui ĝin.

Do, sekve de tio, Viktoro, kiu estis nur 50-jara, emeritiĝis. Li ne volis labori en la ĉefurbo por ne lasi Brigitan tro longe sola.

Li momente akceptis helpi magazenon de la urbeto por fari inventaron, kaj tiun tagon li alvenis tre laca kaj tre malfrue. Brigita jam estis en la lito kaj ŝajnis dormi normale.

Kutime, nokte li estis atentema pri ŝi, kiel patrino por sia infano, vekigante je la plej eta bruo.

Tiun nokton Brigita havis somnambulisman krizon; estis en novembro kaj prujnis.

Tre laca, Viktoro vekigis nur kiam estis taglumo, lia edzino ne plu estis en la lito, nek en la domo. Li trovis ŝin tute malvarma kaj senkonscia en la ĝardeno. Li portis ŝin hejmen, varmigis ŝin per varmaj tukoj kaj vokis la kuraciston.

Ŝi nur momente rekonsciigis, ŝi komencis havi febron. Estis pneŭmonito. Ŝi mortis tri tagojn poste.

Dua parto

Subite Viktoro ekstaris. Ŝajnis al li ke li aŭdis bojadon kaj ĝemadojn. Ne ĉio finiĝis por li ĉar li ankoraŭ vivis. Li skribis ion sur kartono, prenis najlon kaj martelon, eklumigis lanternon kaj rapide foriris al la ŝtonminejo.

Ŝajnis al li vidi iun ombron, kiu malaperis en la nebulon kaj li ekkuregis.

Li esploris la truojn per la lanterno. Nenio moviĝis. Li trovis malnovan bastonon, najlis la kartonon supre kaj enprofundigis ĝin inter la du ŝtonblokojn. Oni povis legi sur la kartono : "Ne dronigu vian hundon, alportu ĝin al Viktoro."

*

La sekvantan tagon, iom antaŭ la nokto, nekonatino alvenis. Ŝi portis dikan sakon sur siaj ŝultroj kaj hundo sekvis ŝin. Ŝi diris : "Ĉu estas vi Viktoro?" - "Jes!" - "Nu jen mia hundo, ĝi havas bonŝancon : hieraŭ mi ne havis la kuraĝon. La afiŝeto ne estis tie. Hodiaŭ posttagmeze la asignisto venis kaj ordonis vakigi la domon. Kelkaj najbaroj vokitaj prenis aĵojn, donis al mi iom da mono, sed neniu volis la hundon. Mi iras al la ĉefurbo, kie oni povas dormi en la subtera fervojo aŭ sub la pontoj, sed mi ne povos iri kun ĝi kaj ĝi estas tro delikata por tranokti ekstere.

Sen respondi, Viktoro metis du telerojn sur la tablon. La virino diris : "Mi eble ĝenas vin, mi vidas ke vi atendas iun, mi foriras!" kaj ŝi ekstaris. "Restu, diris Viktoro, mi ne volas apartigi vin de via hundo. Se vi ne plu havas tegmenton, mi ne plu havas kunvivantinon." - "Ĉu estis ŝi, kiun oni enterigis hieraŭ?" - "Jes!" - "Nu, ne konvenas ke mi restu, estas tro freŝdate!" - "La domo estas sufiĉe granda, du ĉambroj estas liberaj; malgravas la kutimoj, la opinioj de aliulo, sed gravas niaj aĝoj en la vivo kaj por la vivo." Kaj li rakontis al ŝi la kvazaŭan aŭguron de la Grandulo. Laŭ li, estis la tria kaj lasta decido, kiun li devus alpreni laŭ propra konscienca stato.

*

La sekvantan tagon, li iris al la urbodomo por deklari la gastigon de la virino kaj de la hundo.

La oficisto, kiu estis unu el liaj lernejoj kamaradoj, bone komprenis; li vizitis ĉiujn konatojn por rakonti al ili la okazaĵojn kaj petis, ke neniu kritiku tiun savanton de perditaj hundoj.

La tempo forpasis, Viktoro kaj la virino fine geedziĝis, kaj ambaŭ mortis preskaŭ samtempe.

Kvankam la afiŝeto restis apud la truoj de la ŝtonminejo, neniu alportis al ili hundon, sed kiam tiu de la virino mortis, oni donacis alian al ili.

Akcidentita kamparano, kiu posedis la apudajn terenojn, aĉetis la domon kaj konstruis, ĉe la rando de la vojo, malgrandan kafejon kun ŝildo: "Je la memoro de Viktoro, savanto de hundoj" kaj li aranĝis muzeon en la domo de Viktoro, kie oni povas vidi la lastajn akvarelojn de Brigita.

Li vendas poŝtkarton de la ŝtonminejo, sur kiu oni vidas la afiŝeton de Viktoro.

*

Kiam promenanto deziras viziti la muzeon, li momente fermas la kafejon kaj kiam kliento intencas forlasi sian hundon, li regalas lin per aperitivo kaj rakontas al li la belan historion de Viktoro. Tiam, plej ofte la aŭskultinto trovas solvon kaj konservas sian vivkunulon, aŭ lasas ĝin tie nur por kelkaj tagoj.

Pro tio, ĉiuj diras ke, eĉ trans la morto, Viktoro ankoraŭ savas hundojn... kaj eble ankaŭ homojn!

Gastono, 1987-12-26

Postparolo

Mi ne estas profesia verkisto. Mi skribas kiam mi havas ion por diri kaj ke ŝajnas al mi dezirinde diri tion. Aliflanke, ĉar mi estas aŭtodidakto, miaj ideoj kaj mia stilo ne devenas de literatura skolo aŭ de iu ajn doktrino: mia inspiro estas persona kaj ŝuldas multe pli al intuicio kaj al observado ol al instruo, kiam temas pri problemoj rilatantaj al psiko aŭ pri la homa penso.

Antaŭ kelkaj jaroj mi estis pretiganta traktaĵon pri mia individua filozofio kiun mi nomas: "Komuna denominatoro de la homaj aspiroj"; sciencfikcian kaj psikologian romanon pri la edukado de la lasta tera mamulo kaj kelkajn komedietojn.

Ekologiano, somere mi estas sur la tereno kaj mi devigas min verki nur dum la tri vintraj monatoj. Dum la alia parto de la jaro mi skribas nur kelkajn aktualajn tekstojn por la sabataj kunvenoj, aŭ por amikoj.

Se vi havas memoron pri tio, antaŭ kelkaj jaroj, giganta boreala aŭroro daŭris monaton kaj, kiel ĉiuj intuiciuloj, miaj neŭronoj estas influataj de la plenluno, de la sunaj makuloj kaj de diversaj fenomenoj de kosmaj radiadoj. Dum tiu monato, mi kolektis grandan kvanton da ideoj, kiuj, metite sur la

paperon, plenigis miajn tirkestojn.

Unue mi skribis la unuan parton de tiu novelo. La sekvantan jaron, mi havis la ideon pri la dua por fari ion pli kompletan.

Se mi elektis fini tiun tekston antaŭ ĉiuj aliaj, estas pro tri realaj dramoj kiuj funebriĝis mian ĉirkaŭlaron: tri gejunuloj inter 18 kaj 30-jaraj mortigis sin sen havi alian motivon ol rifuzi la sociajn devigojn. Temis pri fraŭlino, medicina doktorino, pri edzigita viro, patro de tri infanoj, anesteziisto en urĝa sekura servo, kaj pri knabino, kiu jam suferis kelkajn psikajn perturbojn kiam ŝi atingis 13 jarojn; iom poste, mi havis okazon psikanalizi ŝin kaj mi sukcese konvinkis ŝin adopti normalan sintenon. Tamen, malgraŭ



sia ŝajna konsento, ŝi petis ke oni lasu ŝin en la kliniko el kie ŝi povis iri al la loka lernejo. Poste, kiam ŝi estis 16-jara, ŝi komencis lerni medicinon pere de la du doktoroj por akiri la flegistinan diplomon.

Por la tago kiam ŝi atingis 18 jarojn, oni organizis feston (ŝi estis el tre riĉa familio). Post la tagmanĝo, ŝi supreniris al la tegmenta teraso, kies aliro estis malpermesata, kaj sin ĵetis sur la deklivon kondukantan al la keletoĝo!

Ĉe la tri kazoj estis religia instruo, kiu normale estus deviginta forigi ĉiun memdetruan ideon.

Ebla klarigo : uzado de medikamentoj kontraŭ la depresiaj statoj, tial ĉi tiuj estas facile haveblaj de la medicina personaro. Ĉiumaniere regula uzo de amfetaminoj aŭ aliaj drogoj ne estas alio ol memdetruo de la individuo, kiu devos repagi iun tagon aŭ alian, ĉu per pli grava depresia stato, ĉu per mallongigo de sia vivo.

La kazo estas sama por la drinkuloj kaj por la fumantoj, ekde kiam la bezono fariĝis postulema, kaj kiam la individuo ne plu kapablas labori normale, se ĝi ne havas sian dozon da alkoholo aŭ sian cigaredon. Aliflanke, mi diras ke la nuntempa socio estas "memdetrua socio" almenaŭ pro tri bazaj kialoj :

1 - La edukado, kiu celas fari individuojn "konkuremajn" ĉiariske. Multnombraj estas la studentoj kiuj uzas amfetaminojn por sukcesi en la ekzamenoj aŭ dum la sportaj konkuradoj.

2 - Forigo de la gusto pri normala strebado pro la ekzemplo pri facileco. Klopodado aŭ strebado ĉiam necesas, kvankam ilia centro ne plu similas al tiu de la antaŭaj generacioj.

3 - Sento de senpoveco antaŭ malsukceso : manko de analizo kaj de serĉo de eblaj sukcesoj en aliaj fakoj. La individuo enpensiĝas, opinias sin fiaskulo kaj konkludas, kiel la anesteziisto antaŭe citita, ke : "La vivo ne estas travivinda."

Kia ajn estu la cirkonstancaro, normala homo ne mortigas sin. Estas ĉiam io farenda. Rekomenci ekde nulo... kiom da homoj faris tion, eĉ plurfoje kaj en malsamaj fakoj!

Memmortigo estas finaĵo nur por tiuj, kiuj kutimas friponi kun la vivo, ĉar por tiu, kiu konscias, kio estas la vivo, kio estas sciinda, kaj nun ni ne scios komplete, malkovrante ĉiutage eron de la senfinaj konoj kiuj progresas sentime, memmortigo estas nepensebla ĉar estas antaŭ ĉio, seniĝi je la morgaŭa spektaklo.

Mia novelo estas esperiga mesaĝo : "Nenio estas perdita dum ni ankoraŭ vivas", estas la kazo de Viktoro post lia vidviĝo : "Restas ĉiam io farenda!" Brigita estas la ekzemplo pri la kompensoj : malgraŭ siaj kriplajtoj, ŝi ne vedadis kaj ŝi provis, ne nur pibeligis sian vivon, sed ankaŭ tiun de la aliaj per siaj akvaretoj pli imagitaj ol realaj.

Ĉio ŝi enkondukas la influon de la granduloj kaj de la adoltoj sur la

malgranduloj, la ekscesan gravecon de paroloj hazarde diritaj, kiuj povas konduki al apartigo, al senhumaneco.

GASTONO 88.01.15

VALO :

Modoj kaj moroj

En Francio, en tiu ĉi malvarmeta vintrofino, iom post iom reaperas la "minijupoj" (jupetoj), kiuj furoris antaŭ kvaronjarcento, kaj intertempe eksmodiĝis.

Antaŭ cent jaroj, se rando de jupo malkovris la piedartikon de virino, tio kaŭzis preskaŭ skandalon. Nun ĉiuj virinoj montras siajn surojn, multaj ankaŭ siajn genuojn, kelkaj, pli kaj pli multaj, parton el siaj femuroj, sen emocii ies prudecon : tio estas laŭmoda, do tre ĝenerale akceptata kaj apenaŭ rimarkata. Konfesinde, tiu modo estas sufiĉe gracia, se nur la gamboj havas belan galbon. Samon oni povas diri pri la modo, sur niaj plaĝoj, de nudaj rondaĵoj, mamoj kaj gluteoj.

Mi notis, ke multaj knabinoj kaj junaj virinoj volonte lasas vidi siajn gambojn - kiam ili ne portas pantalonon (kio iam estus estinta alia kaŭzo de skandalo). Oni scias, kiel en la mezo de la 19a jarcento, provoke efektis la pantalono de la fama verkistino George Sand, kune kun ŝia vira ĉapelo kaj ŝiaj cigaroj; kaj mi memoras, en 1913, kiel malfavorege reagis la publika opinio al la tre efemera lanĉoprovo de la "kulotjupo".

Nu, tiuj demandoj pri modoj ŝajnas frivolaj, ne meritantaj seriozan atenton. Tamen mi opinias, ke el sociologia vidpunkto ili estas signifaj, ĉar ili respondas al evoluo de la moroj. La vesta aŭdaco de George Sand estis manifestado de frua virina liberiĝo. La pantalono de multaj el niaj samtempulinoj simile estas simbolo de moderna feminismo, la minijupoj kaj la nudaj mamoj estas aliaj formoj de sama tendenco. En aliaj epokoj, ekzemple en la 18a jarcento, similaj modaj aŭdacoj respondis al pensa libereco aŭ libertineco, kiun sekvis la hipokritaj modoj de la burĝa prudeco en la 19a. Tiel la flirta balancado de la modo spegulas la evoluadon de la moroj.

Ni vivas nun en periodo de mora libereco, almenaŭ en Okcidento, kaj tiurilate ŝajnas, ke Orienta Eŭropo, Japanio

kaj Ĉinio, konformigas al Okcidento ; ankaŭ iuj nordafrikaj landoj, dum en aliaj sub forta religia influo la vualoj ("litham", "ĉador") pludaŭrigas signojn de virina servuteco. En Irano, antaŭ la prema reĝimo de la "ajatolahoj", multaj virinoj manifestis sian emancipiĝon per forĵeto de la "ĉador". Sendube tiu liberiga movado, nun sufokita, iam reaperos kaj venkos, kaj la reveno de la nudvizaĝa modo anoncos mortsonoron de la subprema moro. In ŝ'Allah!*

* se Dio volos!

Penka Batoeva :

PRINTEMPA VENTO

Vi venos, ĉu?
Ho, venu
kaj min karesu,
vi
printempa vento!
Venu al mi -
- tremanta floro,
venu,
kaj lulu min tenere!
En viaj brakoj
mi kuŝos radianta,
la jarojn forgesinta,
la vivon,
la pasinton.
Ĉu vi rekonos min?
Mi estas tute sama,
tiom da jaroj
mi floris,
malaperis kaj
ree mi ekfloris.

La neĝo venos, ĉu?
Ĉu ĝin mi ŝatu?
La kronon ĝi surŝutos
- ho, frostoj,
frostoj blanka!
Kaj la okulojn
kovros
per brilo perlamota.
Vi ree min amegos,
ĉu ne,
malgraŭ la malsanoj,
malgraŭ ĉesis flori?
Kaj jen
por vi
printempa vento,
mi vivas, mortas, reviviĝas!

Laŭ EPIKTETO :

"Akuzi aliulojn pri siaj propraj malfeliĉoj, tion faras neklerulo; akuzi nur sin mem, tion faras homo, kiu ekinstruiĝas; kaj akuzi nek sin mem nek aliulojn, tion faras jam instruito."

"Feliĉo kaj deziro ne troveblas kune."

EKOLOGIA POEMO

Letero de Ĉefo Seattle
al la blanka Granda Ĉefo
en Washington, 1854.

*

Respondo de nuna homo

Julio Roberto

La tekstoj de la "Ekologia Poemo" estas la transskribo de du leteroj :

- la unua estis skribita en 1854 de la indiana Ĉefo **Seattle** al la blanka Granda Ĉefo en Washington, kiam tiu ĉi deziris aĉeti grandan parton de la indiana teritorio. Tiu letero estas vere unu el la plej belaj, plej klarvidaj poemoj de nia Tero. Tial ni nomis ĝin : **Ekologia Poemo**.
- la dua estas la respondo de hodiaŭa homo al Ĉefo **Seattle**. Simpla omaĝo de iu, kiu vidas nian Mondon mortvundita kaj kiu kredas al la vojo indikita de "Sovaĝulo".

Julio Roberto.

Teksto n-ro 1 : letero de Ĉefo **Seattle**, donacita de UNESKO kaj dissciigita de UNO en 1976, okaze de la memorfestoj de la monda Tago de la natura medio.

Teksto n-ro 2 : letero de Julio Roberto.

Ilustraĵoj de Teresa Soller

Traduko el la franca : Michèle Freud.

Jen la teksto de la indiana Ĉefo.

Kiel vi povas aĉeti aŭ vendi la ĉielon, la varmon de la tero ? La ideo al mi ŝajnas stranga. Se ni ne posedas la freŝecon de la aero nek la movrebrilon de la akvo, kiel vi povas aĉeti ilin ?

Ĉiu peceto de tiu tero estas sankta por mia popolo. Ĉiu luma pinglo de pino, ĉiu sabloplena bordo, ĉiu nebula ŝiraĵo en la malhelaj arbaretoj, ĉiu klarejo, ĉiu insekta zumado estas sankta en la memoro kaj en la sperto de mia popolo. La suko, kiu fluas en la arboj, transportas la memorojn de la "ruĝa homo". La mortintoj de la blankuloj forgesas sian nasklandon, kiam ili promenas inter la steloj.



Niaj mortintoj neniam forgesas tiun mirindan teron, ĉar ĝi estas nia patrino.

Ni estas parto de la tero kaj ĝi estas parto de ni. La parfumaj floroj estas niaj fratinoj ; la cervo, la ĉevalo, la granda aglo estas niaj fratoj. La rokaj krestoj, la suktoj en la kampoj kaj la homo, ĉiuj apartenas al la sama familio.

Tial, kiam la blanka Granda Ĉefo en Washington diras, ke li deziras aĉeti nian teron, li postulas multe de ni. La Granda Ĉefo skribas, ke li rezervas lokon por ni, por ke ni vivu komforte inter ni. Li estos nia patro kaj ni, liaj infanoj. Do ni konsideros tiun aĉetofeŝon sed tio ne estos facila, ĉar tiu tero estas sankta por ni.


La akvo, kiu fluas en la torentoj estas ne nur akvo sed la sango de niaj prauloj. Se ni vendos al vi la teron, vi devos lernigi al viaj infanoj, ke ĝi estas sankta, ke ĉiu rebrilo en la klaraj lagoj parolas pri eventoj kaj memoroj en



la vivo de mia popolo. La murmuro de la akvo estas la voĉo de la patro de mia patro. La riveroj estas niaj fratoj, ili kvietigas nian soifon, ili portas niajn kanuojn kaj nutras niajn infanojn. Se ni vendos al vi nian teron, vi devos montri al la riveroj fratan korinklinon.

Ni scias, ke la blanka homo ne komprenas niajn morojn.

Por li, tera parcelo similas al la sekvanta. Li konsideras sian patrinon la teron kaj sian fraton la ĉielon kvazaŭ aferojn aĉetotajn, vendotajn kiel la ŝafoj aŭ la brilaj perloj. Lia apetito manĝegos la teron kaj malantaŭ li lasos nur dezerton.



En la urboj de la blanka homo, kie la bruego nur ŝajnas insulti la orelojn, ni ne povas ĝue aŭdi la noktan blekon de la kaprimulgo, aŭ la kvakojn de la ranoj ; ni ne povas trankvile aŭskulti la ĉifsusuron de la insektaj flugiloj, la malvolviĝon de la printempaj folioj, la dolĉan sonon de la vento, parfumita de la pinioj, aŭ lavita de la tagmeza pluvo. Se ni vendos al vi nian teron, vi devos konsideri ĝin kvazaŭ sanktan lokon, kie eĉ la blanka homo gustumos la venton mildigitan de la kampaj floroj. Sed se ni akceptos vian ofertan, ni aldonos kondiĉon : la blankulo devos trakti la bestojn de tiu tero kiel siajn fratojn.

Mi estas sovaĝulo kaj mi ne konas alian manieron por vivi. Mi vidis milojn da putrantaj bizonoj forlasitaj de la blanka homo, kiu ilin buĉis el trajno. Mi estas sovaĝulo kaj



mi ne komprenas kiel "la fera ĉevalo fumanta" povas esti pli grava ol la bizonoj, kiun ni mortigas nur por vivi. Kio estas la homo sen la bestoj ? Se ĉiuj bestoj malaperos, la homo mortos pro granda spirita soleco. Ĉar tio, kio okazas al la animaloj, baldaŭ okazos al la homaj estuloj : la aferoj estas ligitaj, kiel la sango kuniganta la saman familion. Vi devas lernigi al viaj infanoj, ke la grundo konsistas el la cindroj de niaj prauloj, ke la tero estas nia patrino, do ĝi devas esti respektata. Tio, kio okazas al la tero, baldaŭ okazos al la filoj de la tero. La homo ne teksis la vefton de la vivo : li estas nur unu fadeno. Se li agas kontraŭ la vefto, li agas ankaŭ kontraŭ si mem. Estas destino komuna por ĉiuj, eĉ por la blankulo, kies Dio parolas kun li. Sed afero, kiun ni scias : nia Dio estas la sama kiel la via. Eble vi pensas, ke vi posedas Lin kiel vi deziras posedi nian teron, sed vi ne povas tion : Li estas la Dio de ĉiuj homoj.

La tero estas kara por Li kaj malutili al la tero, tio estas malestimi la Grandan Kreinton. Ankaŭ la blankuloj malaperos, eble pli frue ol niaj triboj. Daŭre infektu vian liton kaj vi sufokigos iun nokton en viaj propraj rubaĵoj.

Sed mortante, vi lume brilos, ardaĵ pro la forto de Dio, kiu kondukis vin ĝis tiu tero kaj por iu aparta intenco, donis al vi la eblecon superregi tiun teron kaj la ruĝan homon. Tiu destino estas mistero por ni, ĉar ni ne komprenas : la bizonoj estas amase buĉitaj, la sovaĝaj ĉevaloj, dresitaj ; la sekretaj lokoj de la arbaro estas ŝarĝitaj de laodoro de multaj homoj, la floraj montetoj estas malbeligitaj de estuloj parolantaj. Kie estas la densejo ? Malaperinta. Kie estas la aglo ? Malaperinta. Kie estas la bizonoj ? Malaperinta. Tio estas la fino de la vivo kaj la komenco de la transvivo.

Jen la respondo
de hodiaŭa homo el Washington :



Ĉefo Seattle, mia amiko,

Mi legis cian leteron skribitan en 1854. Mi estas homo de la fino de la dudeka jarcento ; ci vivis en grandaj izolejoj, kie la bizonoj kaj la kaprimulgoj nutris cian korpon kaj cian spiriton, mi vivas enkaĝigita en urbejo kaj mi ne plu aŭskultas la murmuron de la vento, la kvakojn de la ranoj en la lageto de la arbaro. Cetere la arbaro ne plu ekzistas, la arboj agonias, la birdoj forflugas.

En la riveregoj, sanktaj por ci, anstataŭ saltantaj fiŝoj, mi vidas nur la rubojn de nia civilizacio, de humanoeco el plasta epoko.

La maro, kiu antaŭ longe venis tenere bani niajn strandojn, nuntempe malpurigas la blankan sablon. Ĝi aspektas trista kiel almozulo, kiu ribelas kaj detruas la grandajn

konstruaĵojn de la inĝenieroj.

Kiam mi rigardas la stelojn kaj la lunklaron, miaj okuloj, kiuj ne plu havas la kutimon kontempli la ĉielon, estas rapide lacaj. Mi ne povas, kiel ci, rigardi rekte la sunon kaj ricevi ĝian lumon sen fariĝi blinda.

Pri la agloj, mi ilin vidis tre malofte. Baldaŭ mi konsideros ilin kvazaŭ prahistoriajn bestojn. Mia amiko Seattle, cia letero estas ankoraŭ aktuala. Cia popolo posedis nek aŭtojn, nek industriojn, nek televidilojn, nek ĵurnalojn, nek la diversajn bonaĵojn de la civilizacio. Ci neniam vojaĝis per supersona aviadilo : cia ĉevalo sufiĉis al ci. Ci prenis la tempon por vivi, mi estas inter homoj, kiuj kurante vivas, kiuj suferas la sendormon, la angorojn pro la rapida streĉa vivritmo. Ci kontentiĝis je malmulto, ni deziras ĉiam pli posedi, ni eĉ kreas al ni novajn bezonojn.

Ni ĉion transformis, ni elpensis aĵojn neimageblajn por ci. Ni anstataŭigis la venton kaj la sunon per afero, kiu nomiĝas nuklea energio. Ni deturnis la riveregojn, ni irigaciis la terojn ; tamen multe da homoj malsatas.

Niaj fruktoj estas kalibritaj, studitaj, greftitaj, flegitaj per kemiaĵoj ; ili estas belaspektaj sed ne parfumaj, ili ne plu havas la guston de la flora nektaro. Cia Tero, nia Tero al kiu, laŭ ci, ni apartenas, nuntempe apartenas al ni. Ni estas ĝiaj mastroj, ni perfortis ĝin sen mildeco, ni penetris ĝian ventron kaj ni detruis ĝian akuŝdeziron. Iom post iom ĝi fariĝas maljuna, ĝi eĉ fariĝas pli malvarma.

Arkitektoj deziris imiti ĝian grandiozon kaj konstruis, kiel en la pasinteco, arkojn kaj kolonojn, ĝardenojn kaj kolorajn vitraĵojn. De tempo al tempo, eĉ en la urbo, ni ankoraŭ vidas unu el tiuj provoj, fariĝintaj kvazaŭ skeletoj, kiuj, iun nokton, estas detruataj de buldozo. (Certe ci ne konas la vorton : buldozo).

Kelkfoje mi havas la teruran impreson aŭdi la plorojn de la arkoj kaj kolonoj, precipe kiam mi vidas ilin agonii antaŭ la fina falo.


Oni diras, ke la cignoj ploras antaŭ ol morti. Mi pensas, ke ankaŭ la beleco ploras antaŭ ol malaperi.

Se ci vidus la nunajn vizaĝojn de la blankuloj! Ili ŝajnas el vakso ; sed ĉar ili estas vivantaj, ĉi tiu vakso, foje, estas kvazaŭ masko de malĝojo, de malamo, kvazaŭ statuo konsumita de la tempo.

Kiel mi diris al ci, mi estas urbano sed mia koro apartenas al la arbaro, al la kamparo. Ho, la bleko de la kaprimulgo, la murmuro de la vento ! Ho, la nektaro de la floroj, la susuro de la insektoj ! Ho, la brilo de la steloj, la klaro de la luno ! Kie vi estas, miaj amikoj ?

Mi certas, ke la respondo troviĝas en cia letero, Ĉefo Seattle. Eble en nia falo, ni finfine sukcesos sekvi la vojon, kiun ci montris al ni.

Tiam ni retrovos la veran sencon de la vivo.



KRUCVORTENIGMO

Horizontale

- 1.- Ĝia salto okazas ĵus antaŭ la vojkruciĝo (s.f.). 2.- Konstante, en la buŝo de niaj kontraŭuloj. - Tia ŝlosilo malfermas ĉiun pardonon. 3. Ujeto por bombonoj (s.f.). - Pusa seraĵo (s.f.). 4.- Talio. - Kaŝi, vuali. 5.- Rilata al ĉarpentista hakilo. - La duono de deksep. 6. - Trudherbo en la ĝardoj. 7.- Devio sen dio. - Speco de primolo, kiu floras tre frue en la printempo (s.f.) 8.- Sesa litero de alia alfabeto. - Tropika fruktarbo. 9.- Sola en sia speco. - Sufikso. 10.- Inter faro kaj ĝi, staras meze granda monto (Proverbo) (s.f.). - Supozeble : produkti ian efikon. 11.- Loko, spaco. - Iu, konis la arton kiel fari nodojn.

Vertikale

- 1.- Nek tro, nek maltro. 2.- Naskiĝintaj en iu duoninsulo. 3. Kun forto, ĝi fariĝas fromaĝo. - Elemento trovebla en jacinto. - Peco de teksaĵo. 4.- Por vidi kion, iu havis en la ventro. 5.- Kunfiksilo. - Formortinta bovo (s.f.). - Ĝi povas esti diabla kiam la vizaĝo estas agrabla (s.f.). 6.- Konjunkcio. - Arto de la poeto. 7.- Simbolo de metalo uzata por fari pintojn de ŝtalaj iloj. - Rilata al elektre ŝargita atomo. 8.- Ĝi pepas ĉirkaŭ la kokino. Prefikso. 9.- Unu movo en la direkto. - fari ion kompleta. 10.- Amaso da animalidoj sur unu loko.


Sfinksido

(s.f. = sen finaĵo)

Solvo de L! 75

Hor.: 1. EDZIĜOPOVA. 2. KA. NEBULET. 3. STRATUS. KR. 4. PAN. OSTITO. 5. ARAO. IUN. 6. NI. KUNLIGI. 7. SEGREGACIO. 8. ISE. SO. IN. 9. ITRIA. FAKA. 10. SRO. NIELOJ. 11. MONITOROJN.

Ver.: 1. EKSPANSIISM. 2. DATA-RIESTRO. 3. RNA. GE. GERON. 4. INA. OKR. 5. ĜETO. UESANT. 6. OBUSINGO. IO. 7. PUSTULA. FER. 8. OL. INICIALO. 9. VEKT. GINKOJ. 10. ATROFIO. AJN.



laŭtaj informoj

la "AMIKECA RETO" ...

estas nova servo, kiu celas helpi al pli kleriga turismo per propono de rektaj homaj rilatoj kun diversaj sociaj viziteblecoj, preter la muzeoj kaj panoramoj.

La ideo tuj ricevis fortan eŝon ĉar post kelkmonata ekzisto, la ĉi-jara listo registris 112 membrojn, en 24 landoj, kiuj detale priskribas multajn

eblecojn.

Unue, tio povas esti VIZITO de domo, laborejo, kooperativo, maljunulejo, sindikatejo, librovendejo, kaj senfina aro da ĉiutagaj vivejoj.

Due, povas esti **AKTIVAJ PROPONOJ** por la plezuro, por amikiĝi, por **vivi** en la lando mem : bicikli, piediri, ĝardeni, kuiri, naĝi, pluki, ludi, boati, skii, fiŝkapti, ktp.

Fine, la vojaĝo povas esti okazo por **DISKUTI** kun aliaj personoj pri tre variaj temoj.

Oni ne povas resumi ĉiujn proponojn. Multaj indeksoj kaj mapoj ebligas inteligentan uzon de la 80-paĝa broŝuro.

La libreto kostas 25 FF kaj via pago rajtigos vin uzi la servon. Rekte aĉetebla per poŝta ĝiro al

ROLLIN Gérard, poŝtkonto 1544 95 V LA SOURCE (Francio)

Lokaj perantoj en Pollando, ĈSSR, Kanado, Izraelio, Brazilo. Rimarko : Ekde 3 ekzempleroj mendataj, vi ĝuas trionan rabaton. Iĝu loka deponprenanto !

FERIA SEMAJNO apud la marbordo dum la Paskaj ferioj

Tiu feria semajno (kaj ankaŭ lingva staĝo por la kuraĝuloj) okazos en Agde de la 5a ĝis la 10a de Aprilo tuj post la kongreso de Albi. La restadprezo por ĉiu tago estas 130 FF. Samloke kongresos la federacio Langvedoko-Rusiljono la 9an kaj 10an de Aprilo.

Informas : J. Hénin, 48500 La Canourgue, Tel: 66 32 86 36

Internacia Esperanto-Konferenco 1988

okazos de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto en la arta kaj historia kadro de urbo METZ (Francio).

- Konferenca temo : INTERNACIA KAJ NACIAJ KULTUROJ sojle de la 2a jarcento de Esp-o, pritraktota dum ampleksa prelegserio;
- Kursoj por komencantoj kaj progresantoj;
- Kunvenoj de kulturaj asocioj (filozofiistoj, historiistoj...)
- Distra programo (teatro, tago "Raymond Schwartz", muziko, bankedo kaj balo);
- Kroma programo por junuloj.

Postkonferenca aranĝo : TRI TAGOJ EN PARIZO.

Informu vin ĉe : ESPERANTO-KLUBO de METZ

M.C.L., 36 rue St-Marcel, F-57070 METZ (Francio)

POŝTKARTO "Saluton el Pau"

Kontraŭ ĝiro de 50 FF al : Esperanto Pau-Adour, pĉk : 36 43 08 F Bordeaux, vi ricevos 22 poŝtkartojn el la E-jarcenta monumento de PAU. Tiu bela pk. montras : 1. La Pirenean Montoĉenon kaj Pinton Ossau, 2. la Kastelon, 3. La numenton de la Skvaro L.L.Zamenhof.

ESPERANTO-GIRONDE : semajnfina staĝo

Grava informo : Nian venontan semajnfinan staĝon ni iam planis okazigi la 23an kaj 24an de aprilo, sed bedaŭrinde ĝuste je tiu dato estos balotado por elekto de la Respublik-prezidento. Tial ni rezignis pri la antaŭvidita dato; sed la staĝo tamen okazos la 14an kaj 15an de MAJO. Por sin-anonco memkompreneble validas la normala aliĝilo, se vi nur ŝanĝas la daton.

Ni pardonpetas pro tia perturbo en nia plano kaj esperas, ke tiu nova dato tamen taŭgos al la interesatoj.

Nia kriminala felietono

Laŭ la bulteneto "La Lettre de l'ADELIP", 11 polaj soldat-servrifuzantoj estas malliberaj. Unu el ili komencis malsat-strikon je la mezo de novembro 87a. Lia adreso estas :

Sławomir Dutkiewicz, s. Mariana,
Aresztsiędzcy, ul. Waly Jagiellonskie 4,
PL-85-131 BYDGOSZCZ, Pollando.

Projekto HELPA (Helpa Esperanto-Ligo Por Amnesty) (Kunlaborado de Esperanto-GIRONDE kaj SAT-Junulfako)

AI (Amnesty International) serĉas novajn rimedojn por ampleksiĝi, por esti ĉiam pli efika. Tial favore respondis ĝia londona sidejo al la helpopropono de Esperantistoj, kaj sugestis la projekton HELPA.

AI bezonas nin. Ek al peresperanta agado por Amnesty! Tio koncernas ĉiujn Esperantistojn, membrojn de AI, aŭ ne.

La celoj de HELPA :

- kolekti adresojn de E-istoj, kiuj pretas kunlabori por AI
- sendi plejeble multajn leterojn al la registarojn, kiuj subpremas la homajn rajtojn.

- subskribigi peticiojn de AI

La funkciado kaj rilatoj kun AI

Ni respektas la etikon de AI. Ĉiumonate E-isto vizitas la kunvenon de la "Grupo 55", loka AI-grupo por reciproka informado. Ĉiumonate Esperanto-traduko de la procedo "urĝaj agoj" de AI informas la membrojn de HELPA pri kazo de opinimalliberulo. Tiam ĉi-lastaj sendos telegramojn, aerogramon aŭ leteron al la koncernata ŝtatestro kaj foje kopion al ties ambasadejo en sia lando.

Aliĝkotizo al HELPA estas nedeviga, libervola. Tiuj, kiuj pagos pli ol 10 FF ricevos nian broŝureton kun informoj pri AI kaj konsilojn por verki leterojn. Ĝi pli detale priskribas AI, la procedon "urĝaj agoj" kaj la projekton "HELPA".
Modelo por aliĝilo : Mi deziras aktivigi per Esperanto por Amnesty International. Mi do pretas sendi ĉiujare (2,4,6,...12)... leterojn, telegramojn aŭ aerogramojn eksterlanden. Eventuale de tempo al tempo aldoniĝas peticio por subskribigi.

Nomo kaj adreso :

dato :

Bv. resendi la aliĝilon al : La maison pour tous, "Esperanto Gironde".
av. du Pdt Auriol, 33150 CENON, Francio

PERIGORDA ESPERANTISTA GRUPO

Komence de februaro okazis la ĝenerala kunsido de la Grupo. Krom la kurso kiu pludaŭras, la grupo projektan regulan elsendon ĉe asocia kaj progresema Radio : Radio Périgueux 103 ; renkontiĝon kun la alia Dordonja grupo : Le Fleix, kaj ekspozicion pri E se estos sufiĉe da mono kaj helpo. Lokaj radioj kaj gazetoj raportas regule pri la vivo de la grupo kaj pri Esp-o.

Por kompletigi mian kolekton, mi serĉas jenajn manovajn numerojn de Laŭte!

* n°4(22) majo-junio 1977 * n°6(24) sept.-okt.77 * n°7(25) nov.77.

* n°11(29) april-majo 78 * n°15(33) nov.-dec.78. Mi pretas donaci al kiu deziras la n-rojn de L!, kiujn mi duoble posedas : N-roj 13, 16, 22, 49 kaj 61.

R. Grandière, 68 allée de la Tour, F 93250 VILLEMOMBLE

LAIKA AMIKARO EYSINES, Fako Esperanto, Maison de Quartier de LA FORÊT, Rue de Castrillon, F 33320 EYSINES Tel. 56.47.03.49 (nur sabate kaj dimanĉe, la 4an kaj 5an de junio).

La inaŭguro de nia strato ESPERANTO okazos la 5an de junio 1988, je la 11a 30. Tiukaze, ni proponas regionan kunvenon, la 4an kaj la 5an de junio laŭ ĉi-subaj detaloj.

Sabaton la 4an - ekde la 15a : akceptado de la partoprenantoj.

15a 30 - 18a : diverstemaj laborgrupoj

18a - 20a : vespermanĝo (bv. kunporti piknikon, ebleco vespermanĝi ĉe Cafeteria CASINO)

20a : distra vespero

Tranoktado : aŭ hotelo, aŭ ĉe gekamaradoj, aŭ tendumado ĉe gekamaradoj.

Dimanĉon la 5an - 9a 30 - 11a : raportoj de la diversaj grupoj

11a 30 : inaŭguro, honorvino

12a 30 : tagmanĝo (vegetaranoj bv. sin anonci)

14a 30 - 17a : temdebatoj. (Bonvolu proponi temojn)

ALVENO por bulvaroj : Barrière de St Médard al ST MEDARD kaj LACANAU.

Iru ĝis la 13a trafiklumo kaj iru maldekstren. la vojo nomiĝas rue d'Eysines. Post kelkaj metroj, iru dekstren, inter la lernejo Edouard Herriot kaj la piedpilktereno, rue du 19 mars 1962, kaj rue de Castrillon.

ALVENO per aŭtoŝoseo : elirejo n°9. Poste, sekvu la markojn metitajn de ni.

Avenue de Magudas. Poste la trafiklumo, iru maldekstren, rue d'Eysines, kaj ankoraŭ maldekstren, inter la lernejo kaj la piedpilktereno.

Por pli da detaloj, bonvolu sin turni al : Gisèle GIZARD, 39 av. de St Médard 33320 EYSINES

Tel. 56.28.89.20 post la 19a

ALIGILO

Bonvolu sendi plej malfrue la 25an de majo al Gisèle GIZARD,

39 avenue de St Médard, 33320 EYSINES

FAMILIA kaj PERSONA NOMO :

Adreso :

Mi alvenos : sabate/dimanĉe

Per: trajno, je la (Ni atentis vin) / veturilo/biciklo

Mi deziras tranokti en hotelo "LES ALIZES", 15 av. de St Médard 33320 EYSINES - Tel. 56.28.36.52

Prezo: unulita ĉambro : 195 F. dulita ĉambro : 220 FF. matenmanĝo : 20 FF

Ni povas rezervigi por vi.

Mi deziras tranokti ĉe gekamaradoj (oni ankaŭ povas proponi lokon por tendumi). Kosto de la dimanĉa tagmanĝo : 30 FF. Ĉi-kune ĉeko : FF

GEJ, JEFO kaj SAT-JF invitas al INTERNACIA JUNULARA RENKONTIĜO en RASTATT, 31.7 - 7.8.1988

Temo :

NACIISMO-INTERNACIISMO-SENNACIISMO en Eŭropo

Tuj post la UK en Roterdamo, do unu semajnon post la IJK en Zagrebo komenciĝos la internacia junulara renkontiĝo de GEJ en kunlaboro kun JEFO kaj SAT-Junulfako en la sud-okcidentgermana urbo Rastatt apud la franca limo.

La temo de la renkontiĝo estos **naciismo, internaciismo, sennaciismo**. Ni pensas ekzemple pri jenaj subtemoj kaj demandoj:

- La kaŭzoj de troigita naciismo - Ĉu ekzistas bona naciismo (ekzemple de subpremataj minoritatoj, indianoj...)? - Kio estas la diferenco inter internaciismo kaj sennaciismo? - La rolo de sennaciismo hodiaŭ en kaj ekster SAT - La solidara rolo de la **interna ideo** laŭ Zamenhof, Lanti kaj Lapenna - Ĉu naciismo estas akordigebla kun Esperantismo? Kio estas Homaranismo? - Ĉu Zamenhof estis Sennaciulo?

Ni ĝojas pri partoprenantoj, kiuj interesiĝas pri prelegoj pri tiu ĉi temo kaj pretas aktive partopreni en la diskut-rondoj. Se vi mem volas kontribui al la tema programo per prelego aŭ gvidado de diskutrondo, bv. turni vin al **Saskia VEEN, Prof. Nijpelstraat 19 D, NL-6224 BS Maastricht tel (+31) 043/6231180**

Tamen en ĉi tiu renkontiĝo ankaŭ tiuj, kiuj nur iomete interesiĝas pri la temo, verŝajne ne pentos sian partoprenon. Ni ja scias, ke hodiaŭ multaj junuloj preferas simple praktiki per Esperanto amikecojn trans la limojn anstataŭ teoriemi ekzemple pri **Esperanto-ideologio...**

Ni jam volas malkaŝi, ke ni antaŭvidas du tuttagajn ekskursojn: al Stuttgart (vizito de la federacilanda parlamento kaj de etnologia muzeo) kaj al Strasburgo (vizito ĉe la Eŭropa Parlamento kaj la Eŭropa Konsilio kun prelegoj koncernantaj nian temon). Krome ni spektos la sovetan filmon **Pento**, promenon tra la apudrejnaj arbaroj kaj biciklos al Alzaco.

Krome ni antaŭvidas intimajn vesperojn kun bonega etoso, muziko de harpo kaj aliaj instrumentoj, komuna kantado kaj aliaj spontaneaj distraĵoj... Se vi mem ŝatas kontribui al la distra programo, bv. kontakti

Dagmar SCHÜTTE, Kerssenbrockstr.16, D-4400 Münster
tel (+49) 251/273024

EJO

Nia luksa, moderna seminariejo estas granda klerika domo, kiu jam plurfoje pruvis sian taŭgecon por E-renkontiĝoj. Ĝi ofertas multajn kunvenejojn, grandan salonon por festoj, baloj kaj koncertoj, meditejojn, kapelon kaj ejojn por teniso, bilardo, piedpilkado kaj naĝado.

Rastatt situas 20 km sude de Karlsruhe; la seminariejo estas atingebla de la urbocentro en 5 kaj de la stacidomo en 15 minutoj. Adreso :

Diözesanbildungshaus St. Bernhard, An der Ludwigsfeste 50
D-7550 Rastatt. Tel (+49) 07222/21194

Kotiztabelo (DM)

	aliĝo antaŭ	
aĝo je 1.8.88	1.6.88	poste
ĝis 25 jaroj	140	160
pli ol 25 jaroj	190	210

partatempuloj ĝis 25 jaroj : 27 DM tage. Pli ol 25 j.: 35 DM.

Aliĝadreso : Simone Fischer, Steinmauerner Str.22
D-7750 Rastatt

Bonvolu antaŭpagi al:

Germana Esperanto-Junularo, Eifelstr.9, D-5300 Bonn
kontonumero 545 77-754 ĉe Poŝtĝiroficejo Karlsruhe
(banka gvidnumero 660100 75)

Mesaĝo al la amikoj de "L." kaj SAT-Broŝurservo

Pro freŝdata anonco de baldaŭa grava modifo en mia profesia vivo (fermiĝos ĉi-jare la stacidometo, kiu ŝirmis dum pli ol du jardekoj mian E-aktivadon), nepre necesos reorganizi la eldonadon aliloke, kaj sub tute aliaj kondiĉoj. Loĝebligado de la muelejo "Moulin de Carque Sac" (vd. lastan paĝon de la januara L!), kie ni iam aranĝis (kaj baldaŭ denove aranĝos) E-renkontiĝejon, eble estos solvo al trovado de nova "Laŭtejo". Tamen, ĉar mi ankoraŭ ne scias kien sendos min deĵori la Ĥervoja administracio, kaj ĉu mi preferos, aŭ ne, antaŭtempe emeritiĝi, ne eblas nun aŭguri pri la estonteco de SAT-BS kaj L!. Mi provizore prokrastas la broŝureldonadon, sed strebos plu aperigi regule la bultenon. Al ĉiuj geamikoj, plej varme amikan saluton de

Kribo

----- la venonta n-ro aperos meze de junio -----

Gérant & imprimeur: Baudé, F 47340 Laroque. CPPAP 58651